


EL POPOLA ĈINIO

中國新報

6

1974





Konstruado kun ĉiam pli grandaj sukcesoj



Prezidanto Maŭ manpremas kun Prezidanto Nyerere.

Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Prezidanto J. K. Nyerere kaj aliaj honorindaj gastoj

Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Prezidanto Julius K. Nyerere de la Unuigita Respubliko de Tanzanio posttagmeze de la 25-a, marto.

Tio estis la triafoja intervidiĝo de Prezidanto Maŭ kun Prezidanto Nyerere. En 1965 kaj 1968, kiam Prezidanto Nyerere vizitis nian landon, Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun li kaj faris intiman kaj amikan interparolon kun li.


Kiam Prezidanto Nyerere alvenis, Prezidanto Maŭ esprimis al li varman bonvenigon kaj intime diris: Ni ne intervidiĝis jam plurajn jarojn. Prezidanto Nyerere varme salutis kaj deziris al Prezidanto Maŭ bonan sanon, forte manpremis kun li kaj kore ĉirkaŭbrakumis lin. Poste, Prezidanto Nyerere prezentis al Prezidanto Maŭ siajn akompanantojn en la vizito ministrojn de eksteraj aferoj John S. Malecela, ministrojn de komunikado kaj konstruado Job Malecela Lusinde, ministrojn de defendo kaj nacia servo Edward Moringe Sokoine, ŝtatan ministrojn de la oficejo de la unua vicprezidanto Hassan Naŝsor Moyo kaj ambasadoron de Tanzanio al Ĉinio R. S. Wambura. Prezidanto Maŭ manpremis kun la honorindaj gastoj kaj poste faris vastampleksan interparolon kun Prezidanto Nyerere kaj ministroj Malecela kaj Moyo. La intervidiĝo iris ĉiam en atmosfero de sincereco kaj amikeco.

En tiu intervidiĝo partoprenis ankaŭ Ĉefministro Ĝou Enlaj, Vicprezidanto Vang Hongven kaj aliaj.

La amikeco inter Ĉinio kaj Tanzanio havas longan historion. Antaŭ pli ol mil jaroj, niaj du popoloj jam havis amikan rilaton. En la longa batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo ili subtenas kaj kuraĝigas unu la alian kaj starigis inter si batalan amikecon. Tiu ĉi vizito de Prezidanto Nyerere al Ĉinio certe faros novan kontribuon por pliiĝi la amikecon inter Ĉinio kaj Tanzanio kaj fortigi la aferon de unuiĝo de Azio kaj Afriko kontraŭ imperiismo.

Varman Bonvenon al Kamboĝaj

Prezidanto Maŭ man-
temas kun Samdek
prodom Sihanuk.




Prezidanto Maŭ man-
temas kun Speciala
konsilanto Ieng Sary.



Kunbatalantoj el la Heroa Lando



Prezidanto Maŭ manpremas kun Vicĉefministro Khieu Samphan.



Prezidanto Maŭ manpremas kun Samdek Penn Nouth.

Sub la bonega situacio, kiam la kamboĝa popolo akiris brilajn venkojn en la nacisava milito kontraŭ Usono, la Delegacio de la Nacia Unueca Fronto kaj la Reĝa Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo kun Khieu Samphan kiel estro kaj speciala konsilanto Ieng Sary kiel vicestro, laŭ invito de la ĉina registaro, faris oficialan amikan viziton al Ĉinio, alportante al la ĉina popolo ĝojigan informon pri la venko de la kamboĝa popolo en la nacisava milito kontraŭ Usono kaj profundan amikecon de la surfrontaj kunbatalantoj. Kun granda ĝojo kaj aparta intimeco, la ĉina popolo varme bonvenigis la kamboĝajn kunbatalantojn el la heroa lando.

Je la 2-a de aprilo, Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Khieu Samphan, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Kamboĝa Nacia Unueca Fronto, vicĉefministro kaj nacidefenda ministro de la Reĝa Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo kaj ĉefkomandanto de la Kamboĝaj Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj, Ieng Sary, speciala konsilanto de la oficejo de la vicĉefministro, kaj membroj de la Delegacio de la Nacia Unueca Fronto kaj la Reĝa Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo estrata de ili.

Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Kamboĝa Nacia Unueca Fronto, kaj Samdek Penn Nouth, prezidanto de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Kamboĝa Nacia Unueca Fronto kaj ĉefministro de la Reĝa Registaro de Nacia Unuiĝo, ĉeestis la intervidiĝon. Prezidanto Maŭ longe manpremis kun la kamboĝaj kunbatalantoj kaj esprimis al ili varman bonvenigon. La intervidiĝo iris ĉiam en varma atmosfero de intimeco, amikeco kaj batala solidareco. Tiun intervidiĝon ĉeestis ankaŭ Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Vicprezidanto Vang Hongven kaj aliaj.

La kamboĝa popolo estas brava kaj refleksebla. Por defendi sian nacian sendependecon, ŝtatan suverenecon kaj teritorian integrecon, la kamboĝa popolo faris longdaŭran justan batalon kontraŭ deekstera agreso kaj gajnis subtenon kaj laŭdojn de diverslandaj popoloj. Nun, la kamboĝa popolo jam akiris grandajn venkojn en la nacisava milito kontraŭ Usono, kaj la popolaj naciliberigaj armitaj fortoj ĉiam pli fortiĝas en la milito. Granda parto de la lando estas liberigita, la demokratia regpotenco estas ĉiam pli fortikigita kaj en la liberigitaj regionoj ĉie regas prospereco. Lastatempe, de la kamboĝa batalejo senĉese alportiĝis informoj pri venkoj. Sub la pezaj batoj de la patriotaj armeanoj kaj popolanoj, la naciperfida kliko de Lon Nol plie izoliĝis kaj estas rapide iranta al pereco.

La Reĝa Registaro de Nacia Unuiĝo kun Samdek Norodom Sihanuk kiel la ŝtatestro starigis diplomatajn rilatojn kun ĉiam pli multaj ŝtatoj kaj ĝuas ĉiam pli altan internacian reputacion. La ĉina popolo varme aklamas la grandajn venkojn de la kamboĝa popolo akiritajn sur la diversaj frontoj kaj kore deziras ke la kamboĝa popolo akiru ankoraŭ pli grandajn venkojn en la estontaj bataloj.

La ĉina kaj kamboĝa popoloj estas intimaj kunbatalantoj kaj fratoj. En la komuna batalo kontraŭ imperiismo, ili ĉiam instigas kaj subtenas unu la alian kaj formis profundan batalan amikecon. La batalo kaj venkoj de la kamboĝa popolo estas granda instigo kaj subteno al la ĉina popolo. La ĉina popolo ĉiam rigardas sian subtenon al la justa afero de la kamboĝa popolo kiel sian plenumendan internacian devon. En la estonteco ni ankoraŭ staros kiel antaŭe ĉe la frata kamboĝa popolo kaj firme subtenos ĝian justan aferon. Ni profunde kredas, ke la vizito de la Delegacio de la Nacia Unueca Fronto kaj la Reĝa Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo al Ĉinio certe pliapaŝe fortigos la revolucionan amikecon kaj batalan unuiĝon inter la ĉina kaj kamboĝa popoloj kaj skribos novan paĝon en la amika historio de Ĉinio kaj Kamboĝo.

Prezidanto Maŭ intervidiĝas kun Khieu Samphan, estro de la delegacio, Ieng Sary, vicestro de la delegacio kaj aliaj kamboĝaj kunbatalantoj.

Fervojo transiranta sennombrajn montojn kaj riverojn

I


En la Granda Proleta Kultura Revolucio de nia lando, la vastaj amasoj de armeanoj kaj popoloj konstruis en sudokcidenta Ĉinio fervojon inter Ĉengdu kaj Kunming, tre gravan trafikaran arterion irantan trans sennombrajn montojn kaj riverojn. En la lastaj preskaŭ 4 jaroj de post la malfermo al trafikado, la kvalito de la fervojo montriĝis tre bona kaj la trafikado glata.

La 1,085-kilometra fervojo komenciĝas de Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉuan-provinco en la nordo kaj finiĝas en Kunming, la ĉefurbo de Junnan-provinco en la sudo. Norde ĝi kunligiĝas kun la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo kaj kune kun ĝi formas trafikaran aorton trairentan nordokcidentan kaj sudokcidentan Ĉinion. La finkonstruo de la fervojo multe mallongigis la distancojn inter la sudokcidenta landlima regiono kaj la ceteraj lokoj de nia lando kaj kreis favorajn kondiĉojn por firmigi la solidarecon inter la nacioj de nia lando, akceli la disvolvon de la industrio kaj agrikulturo de sudokcidenta Ĉinio, ŝanĝi la dislokiĝon de industriaj entreprenoj de apudmaraj kaj internaj regionoj kaj rapidigi la socialisman konstruadon.

En la lokoj trairentaj de la fervojo troviĝas altaj montoj, profundaj ravinoj kaj torrentaj riveroj. La geologia stato estas tre komplika, la klimato kaprica. Triono de la fervojo iras en regiono de sepagrada sismo. En iuj ravinoj la temperaturo altas je 50°C

Skiza Mapo de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo





Fervoja ŝtona arka ponto konstruita en mallarĝa montgorĝo apud Dadu-rivero, kies fundo ricevas sunbrilon nur du horojn en ĉiu tago

kaj en aliaj blovas ventego de 10-a grado. Krome la regionoj abundas je karstaj kavernoj, kaŝaj riveroj, faŭltoj, moviĝemaj sabloj, tergaso, rokeksplodo, terŝtona fluo, pulvora sablo, nitrato k.a., kaj portas la nomon de “geologia muzeo”. En la komenco de la konstruado de la fervojo, iuj alilandaj specialistoj jam konkludis, ke la konstruo estas tute neebla. Sed la ĉinaj fervojistoj, komandantoj kaj soldatoj de la Fervoja Korpuso de la Ĉina Popola Liberiga

Armeo kaj la vastaj amasoj de fervojaj konstruantoj armitaj per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso venke finkonstruis la malfacilegan trunkan fervojon disvolvante la heroismon subigi ĉiajn malfacilojn. La fervojo transiras la riverojn Dadu kaj Ginŝa, trairas la montarojn Daliang kaj Hiaŭliang. Meznombro 1.7 kilometroj de la fervojo havas unu grandan aŭ mezgrandan ponton kaj 2.5 km. de ĝi havas unu tunelon. La pontoj kaj tuneloj longas sume pli ol 400 km. kaj dekoj da stacioj sidas en tuneloj aŭ sur pontoj. La sukcesa konstruado de la fervojo estas senprecedenca en la historio de fervoja konstruado de nia lando. Ĝi estas granda frukto de la proleta kultura revolucio kaj granda venko de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La konstruado de la fervojo komenciĝis en julio de 1958. Sed pro la malhelpo kaj subfoso de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la konstruado preskaŭ haltis en 1962. En aŭgusto de 1964, Prezidanto Maŭ faris la instrukcion **“Rapide konstruu la Ĉengdu-Kunming-an fervojon”**. Soldatoj kaj popoloj venis de diversaj lokoj de la lando kaj komencis ardan batalon por konstrui la fervojon.

La fervojo trairas regionon iam trairitan de la Ruĝa Armeo en ĝia Longa Marŝo. En la batalo por la konstruado kontraŭ malfaciloj de la naturo, fervojaj konstruantoj kaj soldatoj de la Fervoja Korpuso de ĈPLA lernis la revolucian spiriton de la antaŭuloj en la Longa Marŝo. Ili starigis sur sablaj bordejoj de riveroj pajlajn budojn, masonis fornojn en sovaĝaj ravinoj, konstruis sur altaj montoj provizorajn pontojn por konstruado kaj instalis super grandaj riveroj transportajn kablojn. La inĝenieroj kaj teknikistoj prospektoradis transgrimpante montojn kaj transvadante riverojn. Ili zorgeme kalkuladis kaj senĉese plibonigadis projektojn por ŝpari elspezon al la ŝtato.

La fervojaj konstruantoj impete disvolvis la konstruadon.

II

En 1966 Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidis la Grandan Proletan Kulturalan Revolucion kaj ruinigis la burĝan komandojn de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. La tuta konstrua linio fariĝis kunveno de revolucia kritiko. La vastaj amasoj de komandantoj kaj soldatoj de la Fervoja Korpuso de ĈPLA, fervojaj konstruantoj senkompate kritikis la reviziismajn teoriojn de Liu Ŝaŭki kiel “kompradoran filozofion”, “rampismon” k. c. kaj sentime marŝis rekte kontraŭ la malfaciloj metitaj de la naturo.

La batalo de la konstruado estis tre intensa. Malfaciloj aperis unu post alia, sed ankaŭ ĝojigaj informoj de venko intersekvis sin.

24-kilometra parto apud la rivero Dadu havas tunelojn kun totala longeco de 21 kilometroj. Sur la montaro Daliang kun la alteco de 2,300 metroj super la mara nivelo oni fosis tunelon longan je pli ol 6 km. Tiu parto iras tien kaj reen en la monto kaj faris tri cirklojn kruciĝantajn unu super alia. Inter du lokoj en la danĝeriga ravino de la rivero Longĉuan la rekta distanco estas nur 15 km., sed la diferenco de alteco inter ili

atingis 300 metrojn. Por moderigi la oblikvecon oni longigis la fervojan linion inter ili ĝis 37 km. kaj fosis 20 tunelojn kun totala longeco de 18 kilometroj. La fervojo multe meandris en montoj. Iu tunelo faris cirklon de kelkaj km. en monto, finiĝis je la sama loko de la komenco, sed altiĝis je dekoj da metroj.

La malfaciloj ne fortimigis la heroajn konstruantojn. La soldatoj de la Fervoja Korpuso de ĈPLA kaj la fervojistoj brave diris: “Ni havas la kuraĝon grimpi sur la ĉielon kaj trabori la teron. La danĝeraj montoj kaj riveroj nin obeos kaj antaŭ herooj ne ekzistas malfaciloj.”

La 11-a kompanio de iu trupo de la Fervoja Korpuso devis fosi tunelon en loko kun tre komplika geografio kaj tre varia formacio, jen disfalema ŝtontavolo, jen blua ŝtalo malmola roko. En somero ekster tunelo la suno bakbrunigis la haŭton de la konstruantoj en subĉemizo. En la tunelo oni laboris kvazaŭ en vaporumilo. Sed neniu plendis pro tio. Iufoje, tuj post eksplodo de mino frida akvo ŝprucis el rokfendo — oni trafis kaŝan riveron. De tiam la temperaturo en la tunelo abrupte falis, kaj oni laboris kvazaŭ en pluvego. La akvo pro-



Fervojaj konstruantoj de ĈPLA fosas tunelon de la fervojo.



Nacimalplimultaj virinoj ĝoje atendas vagonaron.

fundis ĝis la genuo kaj ĉiun diurnon el la tunelo elfluis pli ol 9,000 tunoj da akvo. Hieraŭ la konstruantoj laboris kvazaŭ en bakforno, sed nun ili tremis de malvarmo. Tamen la konstruantoj persiste laboris kaj ĉiumonate superplenumis siajn taskojn.

La suda parto de la fervoja linio havas tunelon kiu decidis la daton de finkonstruo. La tunelo longas nur iom pli ol 1,000 metrojn, sed la formacio estas ege malfavora. Terfalo okazis fojon post fojo kaj multe malfaciligis la konstruadon. Por krei kondiĉojn favorajn al pli frua malfermo de la fervojo al trafiko, iu trupo de la korpuso komencis ĝeneralan ofensivon kontraŭ la loko.

En iu tago, pro fortega frapo de monta torento, falis intradorso de la tunelo. Centoj da kubmetroj da ŝto-

noj kaj tero falis, ŝtopis la tunelon kaj enfermis subplotonestron Luo Gjunguj kaj aliajn 12 soldatojn en tunelparto longa je malpli ol 10 metroj.

Diversaj materialoj, per kiuj aliaj lokoj de la patrolando subtenas la konstruadon en la sudokcidenta limregiono, estas transportataj al la lokoj ambaŭflanke de la fervojo.





Varvagonaro kuras sur la serpenta kaj meandra fervojo.

En tiu danĝera momento, Luo Gjunguj, komunisto hardita en la Granda Proleta Kultura Revolucio, decideme diris: “Kamaradoj, ni estas popolaj soldatoj. Se la ĉielo falus, ni subapogu ĝin; se la tero kaviĝus, ni plenigu ĝin. En la lasta momento de la vivo ni ankoraŭ devas fari kontribuon al la Partio kaj la popolo.” La kamaradoj kune voĉlegis parkere la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Tiu ĉi armeo posedas spiriton sentime marŝi antaŭen kaj ĝi nepre faligos ĉiujn malamikojn, sed neniam estos subigita de malamikoj. En kiel ajn malfacilaj kaj penigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu sola homo, li batalos plu.”** La 13 kamaradoj formis firman batalan kolektivon, pririgardis la danĝerajn lokojn kaj firmigis la framojn. La aero fariĝis pli kaj pli maldensa, sed ĉiu prenis ŝovelilon kaj remetis la

preparitan betonon sur la intradorsan arkaĵon helpe de malforta lumo de poŝlampo. Tiam ankaŭ kamaradoj ekster la tunelo tutforte fosadis la ŝtopaĵon kaj fine elsavis ilin. Tiuj eldanĝeriĝis, sed ne ripozis eĉ unu minuton kaj tuj komencis kune kun la aliaj la batalon de forigo de la falinta teraĵo.

Post penema batalo de 150 diurnoj traksterna trajno fajfante trairis la milmetran tunelon antaŭen.

III

Ankaŭ la konstruado de centoj da pontoj estis tre malfacilega. Super larĝaj riveroj oni devis konstrui grandspanajn pontojn kaj en profundaj ravinoj oni devis konstrui pilierojn altajn kiel 15-16-etaĝa domo. La konstruantoj timis nek varmegon por konstrui ponton alte en la aero nek

Intima parolado inter trajnoestrino kaj pasaĝerinoj




froston por pretigi konstrufosaĵojn de pili-eraj bazoj en glaciĝinta rivero.

La intermonto Laŭĉang apud la rivero Dadu estas fendo profunda je 300 metroj kaj longa je preskaŭ 3 kilometroj. En la fendo ŝvebas nuboj kaj ĉiutage nur du horojn oni povas vidi la sunon. Inter la du krutaj rokmuroj oni devis konstrui ŝtonan ponton kun spano de 54 metroj. Iuj teknikaj “aŭtoritatuloj” diris, ke en la mondo ne estas tia precedenco kaj tio estas nekonstruebla. Sed la laboristoj rompis la superstiĉon, liberigis sian penson kaj diris: “Kion la aliaj landoj havas, ni devas havi; kion la aliaj landoj ne havas, ni ankaŭ devas havi!” Ili kombinis la revolucion spiriton kun scienca

sinteno kaj mem faris projekton. Kaj per 55 tagoj ili finkonstruis la fervojan ŝtonan ponton.

Iun vesperon, la 1-a kompanio de iu trupo de la korpuso estis streĉe laboranta sur la konstruejo de granda ponto. Subite la ĉielon plene kovris plumbaj nuboj, kaj ekbriloj de fulmo kuradis tra la ĉielo. Furioza vento frapadis kunportante pluvegon kaj fabograndajn hajlerojn. La estro de la kompanio Huang Delong pensis, ke la kompanio estas sturma trupo en traksternado kaj metado de pontotrajtoj. La uragano povas hardi la revolucion volon. Li kunvokis sur la ponto kunvenon por konsiliĝi pri la demando ĉu daŭrigi la laboron. La soldatoj




Ji-nacieca laboristo Ĝang Venguang, (la maldekstra), kiu partoprenis en la konstruado de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo, nun laboras kiel stiristo de dizela lokomotivo sur la nomita vojo.

diris: “Ni devas kapti ĉiun sekundon por pli frue finkonstrui la fervojon, ni laboru plue malgraŭ la ventego kaj pluvego!” Ili diskutis pri sekurigaj metodoj por metado de pontotrajtoj en pluvego kaj ventego kaj decidis daŭrigi la laboron.

La vento kaj pluvo fariĝis pli intensaj. La 100-tuna trabo levita de la pontokonstrua trajno senĉese balanciĝis en la ventego. En tiu kriza momento, komunisto, vicestro de subploto Fu Kang-je saltis sur la longan brakon de la trajno. En la furioza ventego

La ponto super Dadu-rivero, rigardata el la tunelo



li ne povis firme stari. Subite li aŭdis la krimon de la kompaniestro sur la trajno: “La membroj de la Komunista Partio de Ĉinio, kiuj ĵuris batali dum la tuta vivo por komunismo, devas fari firman decidon, ne timi oferon, superi ĉiujn malfacilojn kaj gajni venkon!” Fu Kang-je kvietigis sin kaj sagace rampis ĝis la ekstremo de la brako malgraŭ danĝero. Li malsupreniris laŭ ŝtala kablo sur la trabon, rapide faris necesajn aranĝojn en kunago de la kamaradoj, senmovigis la balanciĝantan trabon kaj faligis ĝin sur la pilierojn.

Per tia spirito, la soldatoj rompis la rutinon ke en pluva kaj venta nokto oni ne povas konstrui ponton, kaj per du skipoj ili instalas 4 trabojn. La kompanio kreis novan rekordon en metado de traboj.

Traksterna trajno tagnokte antaŭenmarŝis senhalte kaj la fervojo senĉese longiĝas

transirante sennombrajn montojn kaj riverojn.

En la 1-a de julio de 1970, en la ĝojega celebrado de la tuta popolo por la datreveno de la naskiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo estis malfermita al trafiko. Du feste ornamitaj trajnoj veturigantaj laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj reprezentantojn de frataj nacioj startis respektive de la du urboj Ĉengdu kaj Kunming kaj renkontiĝis en Hiĉang, iam trapasita de la Ruĝa Armeo en ĝia Longa Marŝo. Tie cent mil armeanoj kaj popoloj okazigis solenan festan kunvenon.

La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio telegrame gratulis al la tuta konstruantaro de la fervojo, ke ili superis la multajn malfacilojn, venkis imperiistojn, reviziistojn kaj reakciulojn en la batalo por tempo kaj rapideco, per tio ili faris grandan kontribuon al la Partio kaj la popolo.

La funkciado de la fervojo multe akcelas disvolviĝon de la industrio en la regionoj traŭrataj de la fervojo. Jen parto de la Kunming-a Fera-Ŝtala Fabriko.




Pretigis la unua parto de la Dangiangoŭ-a Akvoreguliga Ŝlosila Konstruaĵo


GRANDA baraĵo estas konstruita trans la rivero Hangiang, la plej granda branĉo de Jangzi-rivero, kaj haltigas ĝian fluon. Antaŭ la baraĵo formiĝis vasta arta lago. La akvo fluo kuras suben laŭ la volo de homoj, kaj tiea hidroelektra centralo dissendas potencon kurenton al diversaj lokoj. Ŝipoj pasantaj estas mekanike portataj trans la baraĵon. Tiu grand-skala Dangiangoŭ-a akvoreguliga ŝlosila konstruaĵo situas en Hubej-provinco ĉe la kunfluejo de la riveroj Hangiang kaj

Dangiangoŭ, kaj estas projektita kaj efektiviĝita de ĉinoj, ĝi utilas por eviti superakvegon, irigacii kampojn, produkti elektroenergion, faciligi navigadon kaj ebligi fiŝbredon. Ĝia unua parto estas lastatempe pretigita sukcese.

La pretigita parto konsistas el betona akvobaraĵo 2.5 km. longa, hidroelektra centralo kun instalitaj generatoroj de kapacito de 900 mil kilovatoj, ŝiplifto kun levpovo de 150 tunoj kaj du kanaloj

La 2.5 kilometrojn longa digo de la Dangiangoŭ-a akvoreguliga ŝlosila konstruaĵo





La konstruantoj de la Dangiangoŭ-a konstruaĵo en lernado

povantaj konduki akvon po 600 kubmetroj sekunde.

La rivero Hangiang longas 1,530 kilometrojn, fontas de la suda piedo de la montaro Kinling, kuras tra la montaro Baŝan kaj suda Ŝenhi-provinco kaj fluas en Jangzi-riveron ĉe Vuhan de Hubej. Dum la tempoj de akvoabundo antaŭ la Liberiĝo, la akvofluego de la supra fluejo torentis tre furioze, sed la malsupra fluejo estis mallarĝa por ellasi la akvon kaj cetere renkontis obstrukcon de la samtempe leviĝanta akvonivelo de Jangzi-rivero, tial okazis ofte inundkatastrofoj. Tiam la reakcia registaro ja ne zorgis pri ordigado de riveroj. En 1931 la akvego de Hangiang rompis 14-loke la digojn, kovris 446 mil hektarojn da kampoj kaj kaŭzis morton al pli ol 80 mil homoj.

Dank' al la nove konstruita cementa baraĵo formiĝis tre granda akvokonservejo en la montara regiono en nordokcidenta Hubej kaj sudokcidenta Henan, kies granda

entena kapacito de akvego primare forigis la minacon de inundo al la meza kaj malsupra basenoj de Hangiang kaj provizas sufiĉan akvokvanton por irigacii la origine akvomankan regionon en suda Henan kaj norda Hubej kaj tiel disvolviĝas produktaĵoj de grenoj kaj kotono stabile riĉrikolta dum jaroj de sekeco aŭ troabundo de akvo. En 1973, 50 mil hektaroj da kampoj ricevis senprecedence riĉan rikolton, dank' al la akvoprovizo el Dangiangoŭ-akvokonservejo.

Ekde 1968, kiam la unua generatoro ekfunkciis, la Dangiangoŭ-a Hidroelektra Centralo jam fariĝis unu el la gravaj elektrofontoj de Henan kaj Hubej kaj multe kontribuis en la agrikultura kaj industria produktaĵoj en la koncernaj regionoj.

La pretigo de la unua parto de la konstruaĵo ebligis la grandskalan disvolviĝon de surakva transportado sur Hangiang. La vasta akvokonservejo kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi akvan produktadon.


La konstrulaboro komenciĝis de 1958. 100 mil konstruantoj el diversaj gubernioj de la Hangiang-rivera baseno kune luktis ŝultro ĉe ŝultro sub la kuraĝigo de la ĝenerala linio fiksita de Prezidanto Maŭ: **“Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie.”** Por konstrui la akvokonservejon, partoj de la gubernioj Gjunhian de Hubej kaj Ĝeĉuan de Henan devis esti subakvigotaj, la tieaj loĝantoj meminitate cedis siajn loĝejojn kaj kampojn hereditajn de generacioj, transloĝiĝis de la loko sub la unueca dispozicio kaj helpo de la ŝtato kaj rekomencis energie produktajn laborojn en la nova loĝloko. Ili diris: “Tio ne estas damaĝo al ni por bridi Hangiang, turni malutilon en utilon kaj konstrui socialismon.”

En la komenco, ne sufiĉis teknikaj ekipaĵoj. Tamen oni ne atendis la alvenon de ekipaĵoj, sed komencis transportadon per vektoj kaj prepari betonon per manlaboro. Kiam oni konstruis ĉe la dekstra bordo provizoran digon uzatan por bari akvon kaj purigi la bazgrundon de la granda baraĵo, mankis al ili taŭgaj ŝtalaj platfostoj, ili serioze resumis spertojn de la amasoj kaj aplikis la rimedon fari digon el tero, ŝtonoj kaj sablo. Post sesmonata klopodado en malfaciloj, oni sukcesis konstrui digon 1,300 metrojn longan kaj 13 metrojn altan kun kvalito postulata de la projekto.

Dank’ al la principo de apogo sur la amasoj kaj propraj fortoj, la progresado de la konstruado multe rapidiĝis.

Jen la ŝiplifto kun levpovo de 150 tunoj





La instalitaj generatoroj de la Dangiangoŭ-a Hidroelektra Centralo kun kapacito de 900,000 kilovatoj

En 1960, kiam glate progresis la barado de la fluo de Hangiang, Liu Ŝaŭki kaj lia bando provis nuligi duonvoje la projekton sub la preteksto pri la tiamaj malfaciloj provizore kaŭzitaĵoj de naturaj katastrofoj al la nacia ekonomio. Sed la konstruantoj sukcese rezistis al la intrigo, sub gvido de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ili ne submetiĝis al la renkontitaj malfaciloj. La laboristoj entreprenis mekanigon de laboroj por rapidigi la konstruadon kiel respondo al la subfosado fare de la malamikoj. Ili finpretigis laborlinion kun longeco de pli ol du kilometroj, kiu inkluzivis minadon kaj kolektadon de ŝtonoj kaj sablo, transportadon de konstrumaterialoj, kribradon de sablo, preparadon de betono, pezlevajn laborojn kaj aliajn. Per tio la laboroj multe plirapidigis.

La Orienta Elektromaŝina Fabriko prenis sur sin la taskon de provfabrikado de akvoturbinaj generator-kompletoj kun kapacito de 150,000 kilovatoj. La laboristoj, kadroj kaj teknikistoj kune faris teknikajn renovigojn kaj uzis malgrandajn ilmaŝinojn en prilaborado de grandaj maŝinpartoj. Fine ili sukcese elfaris la unuan akvoturbinan generator-kompleton kun la postulata kapacito, plene elmontrante la revolucionan bravecon de la ĉina laborista klaso lukti en malfaciloj kaj apogi sin sur la propraj fortoj.

En 1966, la komenciĝo de la Granda Proleta Kultura Revolucio puŝis la konstruadon al nova alta tajdo. Laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**, la laboristoj kritikis la krimojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kiuj ĝenis kaj subfosis la konstruadon, kaj tiel rapidigis la progresadon de la laboroj.

En julio de 1970, la konstruata granda baraĵo atingis la altecon postulatan laŭplane por la unua etapo. Por instalado de la unua generator-kompleto oni uzis unu jaron. Post kiam la instalistoj senĉese renovigis la teknologion, la tempo por instalado de unu kompleto estis reduktigita ĝis tri monatoj.

Dum la konstruado, multaj laboristoj, kamparanoj kaj kadroj sin hardas en la fornego de revolucio. Ĝu Hiangŝju konata kiel “mortomaltimulo” estas unu el ili. Riskante sian vivon, li plurfoje brave subakviĝis profunde kaj sagace forigis obstaklojn sub la akvo. Preskaŭ ĉiuj unuoj partoprenintaj en la konstruaj laboroj havis tiajn modelajn laborantojn kiaj estas Ĝu Hiangŝju.

Vizito al ambaŭ bordoj de Hangiang-rivero

POST pretigo de la unua parto de la Dangiangoŭ-a akvoreguliga ŝlosila konstruaĵo de Hangiang-rivero, ni havis ŝancon viziti la mezan kaj malsupran basenojn de la rivero rekte favoratajn de la konstruaĵo. Ĉie en la basenoj vidiĝas retoj da kanaloj kaj multaj kulvertoj, kaj elektraj pumpstacioj grandaj kaj malgrandaj. Ambaŭborde etendiĝas senlimaj fekundaj kampoj, aromas la rizfloroj kaj gaja kanto de komunumanoj sonoras tra la kampo.

Aprezante la vivplenan scenon kaj la bone kulturitajn kampojn, la vizitantoj unuafoje venintaj neniel povas imagi al si, ke la loko antaŭe estis ofte inundita regiono en la baseno de Hangiang-rivero.

ĈE LA LOKO DE ANTAŬA DIGBREĈIĜO

Per siaj travivaĵoj maljunaj komunumanoj faris al ni komparon pri la hodiaŭo kaj pasinteco. En la malnova Ĉinio, la putraj kaj senkapablaj reakciuloj ne povis jungi Hangiang-riveron, tial ĝi ofte serioze inundis la regionon. De 1931 ĝis 1948, la digoj de Hangiang-rivero breĉiĝis en 11 jaroj. Dum inundo la vasta ambaŭborda regiono fariĝis akvolando, la akvo englutis homojn kaj brutojn, detruis domojn kaj kampojn. Kaj la kamparanoj devis fuĝi al aliaj lokoj kaj vivteni sin per almozpeto. Eĉ en sonĝo la popolanoj deziregis jungi la riveron.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio realiĝis ilia deziro sub la prizorgo kaj gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. La popolanoj de la baseno de Hangiang-rivero aktive faris ordigon, plifortikigis la digojn kaj riparis la digetojn de ĝiaj branĉoj, prenante inundo-preventadon kiel la centron. En 1956 oni konstruis kontraŭinundan konstruaĵon en Mianjang-gubernio de ĝia malsupra baseno kaj per

tio multe fortigis la kapablon por batali kontraŭ inundo en ĝiaj meza kaj malsupra basenoj. La pretigita unua parto de la Dangiangoŭ-a akvoreguliga ŝlosila konstruaĵo defendas cent milojn da hektaroj de la meza kaj malsupra basenoj de Hangiang-rivero kontraŭ inundo kaj kreis favorajn kondiĉojn al la socialisma konstruado en tiu ĉi regiono.

Mianjang-gubernio, kiu estas ĉirkaŭata de Hangiang-rivero kaj ĝiaj branĉoj, situas malalte kaj antaŭe suferis de inundo. Post la Liberiĝo, dank' al riparo de la digoj oni reduktis minacon de inundo, sed oni devis ĉiujare doni trionon de la guberniaj laborfortoj al la dig-riparado kaj urĝa riparo. Post kiam Dangiangoŭ-baraĵo ekfunkciis en 1968, tiu gubernio vintre kaj printempe donis nur mal multe da laborfortoj al regula dig-riparado, tial plejparto de laborfortoj kaj monsumo povas esti disponigitaj al aliaj konstruoj. Post energia konstruado de preskaŭ kvin jaroj, la gubernio fosis pli ol 2,200 kanaletojn, pli ol mil kulvertojn kaj kluzojn, kaj pli ol 350 elektrajn pumpstaciojn. La antaŭe ofte inundita regiono fariĝis grava bazo de greno kaj kotono sur la ebenaĵo inter la riveroj Jangzi kaj Hangiang.

Hianfeng-brigado de tiu gubernio situas ĉe la breĉiĝema parto de digo de Hangiang-rivero. Pro la oftaj inundoj en la pasinteco tieaj vastaj fekundaj kampoj estis kovritaj de aluvio dika je kelkaj metroj, tial la loko fariĝis plej sterila en la gubernio. Nun la minaco de inundo estis forigita. Sub la gvido de la kompartia filio de la brigado, la komunumanoj lernis de Daĝaj, faris forstumadon por protekti kampojn kontraŭ vento kaj senmovigi sablon, fosis profundajn kanaletojn kaj reformis kampojn, tiel ke ĝi akiris riĉan rikolton de rizo, milio kaj kotono en sinsekvaj jaroj.

RIZFLOROJ AROMAS SUR MONTETOJ ANTAŬE KALVAJ

Traveturinte per ŝipo la smeralde ondetantan Dangiangoŭ-akvokonservejon, ni ascendis monteton kaj vidis sube grandan kanalon foren etendiĝantan. La kanalo ekkonstruita de 1969 longas pli ol 70 kilometrojn kaj kondukas akvon de Dangiangoŭ-rivero en la kampojn de la nordaj partoj de la tri gubernioj Guanghua, Hiangoŭ-jang kaj Zauĵang de Hubej-provinco.


La vastaj malaltaj regionoj ambaŭborde de Hangiang-rivero antaŭe ofte suferis de inundo kaj la montetaj regionoj ofte de sekegeco. Guanghua-gubernio situas norde de Hangiang-rivero kaj al ĝia norda parto ekstreme mankis akvo. Antaŭ la finkonstruo de Dangiangoŭ-akvokonservejo, la popolanoj de Guanghua-gubernio faris iujn akvoreguligajn konstruojn, tial la produktado disvolviĝis certgrade, sed ili ne radikale solvis la problemon pri manko de akvo. Nun Jindan-kanalo trafluas Guanghua-gubernion. Sub la gvido de la kompartia komitato de la gubernio la popolanoj fosis pli ol 350 ĉefajn, branĉajn kaj etajn kanalojn kun totala longeco de pli ol 700 km., kiuj unuapaŝe formis irigacian reton de la gubernio kun Jindan-kanalo kiel la centro. La areo de ĝiaj rizkampoj rapide kreskis de 280 hektaroj en la komenca periodo post

la Liberiĝo ĝis 11,300 hektaroj kaj samtempe ankaŭ pliiĝis la areo de irigaciataj kampoj. Tiu antaŭe grenmanka gubernio komencis vendi al la ŝtato superfluan grenon en la lasta jaro.

Kangvan-brigado de Hiangoŭ-jang-gubernio najbara al Guanghua situas en antaŭe kalvaj montetoj sojfantegaj. Post unufoja sekegeco ĝi ne povis restariĝi eĉ en kelkaj jaroj. Iun jaron preskaŭ ĉiuj kamparanoj de kelkaj vilaĝoj forfuĝis al aliaj lokoj pro sekegeco kaj preskaŭ ĉiuj el la loĝantoj de du vilaĝoj mortis. Iu vilaĝano nomata Vu Ŝunking fuĝis al alia loko kun siaj kvin familianoj kaj tri el ili mortis. Post la Liberiĝo la vilaĝanoj fosis lageton kaj unuapaŝe moderigis la akvomanikon sub la gvido de la Partio. Kiam oni fosis Jindan-kanalon, la komunumanoj de tiu brigado aktive faris sian kontribuon. Vu Ŝunking iris al la kanal-fosejo kune kun siaj kvar laborkapablaj familianoj. La 220 hektaroj da agroj de tiu brigado nun plejparte estas irigaciataj per la kanalo. Kaj en la unua jaro ĝi jam akiris riĉan rikolton.

En 1973 Jindan-kanalo ekfunkciis, kaj la gubernioj Guanghua kaj Hiangoŭ-jang tiujare akiris 400,000, 000 kubmetrojn da akvo el la akvokonservejo por irigacii siajn 48,000 hektarojn da kampoj, kio pretigis favorajn kondiĉojn por riĉa rikolto. La tuta akvoregula konstruo estas ankoraŭ ne komple-

Barĝaro sur Hangiang-rivero



tigita, kaj en la nordaj partoj de la tri gubernioj miloj kaj miloj da komunumanoj streĉe konstruas kluzojn, akveduktojn, elektrajn pumpstaciojn kaj milojn da malgrandaj akvoreguligaj konstruaĵoj.

ELEKTRAJ LAMPOJ ANSTATAŬ TORĈOJ

Ni veturis de Dangiangoŭ orienten per trajno kaj atingis novan industrian urbon Hiangfan en Hubej-provinco. Ĉi tie estas larĝaj stratoj, fabrikaj domoj staras unuj post aliaj, la granda Hiangfan-ponto etendiĝas super Hangiang-rivero kaj ĉie viglas trafiko.

Antaŭ la Liberiĝo Hiangfan ne havis eĉ unu menciindan fabrikon, nek elektran centralon, kaj la stratoj estis mallarĝaj. En 1949 tiu antikva urbo saviĝis de kadukeco. Kun la disvolvo de konstruaj aferoj de la ŝtato, ĉi tie konstruiĝis termo-elektrejo kaj lokaj industriaj entreprenoj. Post la ekfunkcio de Dangiangoŭ-a hidroelektra centralo, la nombro de la fabrikoj en la urbo superis 200, kiuj fundamente formis lokan industrian sistemon. Ĝia totala industria produktovalorado de 1972 pliiĝis kvaroble kompare kun tiu de 1971, kiam la hidroelektra centralo ankoraŭ ne komencis liveri elektron. Ĝia totala industria produktovalorado de januaro ĝis oktobro de 1973 pliiĝis je 70.5% kompare kun tiu de la sama periodo de la jaro 1972. La antikva urbo nun brave antaŭenmarŝas al prosperiĝo.

Dangiangoŭ-a hidroelektra centralo estas unu el la gravaj elektraj fontoj de la provincoj Hubej kaj Henan. La totala kapacito de ĝiaj instalitaj generatoroj egalas al 22.5-oblo de la produktita elektro de 43 jaroj antaŭ la Liberiĝo. Ĝia potenca kurento estas liverata al urboj kaj kamparo de Hubej kaj Henan kaj forte akcelas la industriajn kaj agrikulturan disvolvon de tiuj regionoj.

Vuvu-brigado de Guanghua-gubernio situas sur flavgrunda monteto. Pro manko de elektro kaj alta nivelo, akvo de la akvokonservejo ne povis tien flui, tial ĝia kontraŭsekeca kapablo estis tre malforta. Nun tiu brigado efektiviĝis mekanikigon de drenado, irigacio, draŝado, muelado k.a., dank' al kio 40% de la laborfortoj liberiĝis el pezaj laboroj. Oni konstruis du elektrajn pumpstaciojn, fosis ĉirkaŭmontetajn kanaletojn, fosis kaj grandigis 45 lagetojn. En 1972 sekegeco daŭris 100 tagojn, la komunumanoj venkis la katastrofon plene utiligante siajn elektrajn pumpilojn kaj akiris bonan rikolton de greno, kotono kaj oleaj plantaĵoj.

Ni veturis per aŭto okcidenten laŭ la transmisia linio kaj venis al monta komunumo kun malfacila

trafiko. Kiam nokto vualis, elektraj lampoj trembrilis en la domoj sur montoj aŭ en arbaroj. En la pasinteco oni uzis torĉon por prilumado, sed nun elektro servas al la popolanoj en irigacio, muelado kaj disaŭdigado. En la montvilaĝoj ĉie regas prospereco.

HANGIANG-RIVERO EN VIGLA TRAFIKADO

Kiam ni veturis sur Hangiang-rivero per ŝipo, ni vidis alian aspekton: La rivero furiozinta milojn da jaroj nun estas obeanta al la homa volo. Ĝi kviete fluas malsupren. Ĝia meza kaj malsupra riverujo, kiu kun multaj malprofundaĵoj antaŭe ofte ŝanĝiĝis kaj ne povis esti normale navigebla, estas fundamente stabila. Post ordigado ankaŭ la mallarĝa riverujo, torenta fluo kaj malfacila navigado de ĝia supra parto estas ŝanĝitaj.

Hangiang-rivero longas je pli ol 1,500 km., sed antaŭe nur mallonga parto de ĝia malsupra baseno estis navigebla en iuj sezonoj. Tiam la danĝeraj malprofundejoj kaj torenta fluo minacis la vivon kaj posedaĵojn de la ŝipistoj. En la komenca periodo post la Liberiĝo oni komencis ordigi Hangiang-riveron, eksplodigis rifojn kaj iom post iom longigis navigeblan linion. De 1957 oni komencis noktan navigadon. Post la finkonstruo de Dangiangoŭ-baraĵo la flukvanto de Hangiang-rivero estas stabila, mil-tonela ŝipo povas navigi nokte sur ĝia malsupra parto kaj 300-tonela ŝipo tutjare sur ĝia meza parto, kaj 150-tonela ŝipo povas atingi Bajhe de Ŝenhi-provinco. Tio multe favoras al la disvolvado de trafiko inter urboj kaj kamparo.

La akvokonservejo Dangiangoŭ estas granda fiŝbredejo, sur kiu povas navigi ankaŭ ŝipoj. En la fino de 1967 oni komencis fiŝbredon kaj aŭtune de 1969 fondis la unuan fiŝkaptan taĉmenton en ĝia nordokcidenta bordo. Kvankam al montanoj mankis sperto pri fiŝbredejo, tamen ili kuraĝis fari praktikon kaj iom post iom pliiĝis breditajn fiŝspeciojn kiel bramo, nigra karmo, mandarina fiŝo, karaso k.a. La akvokonservejo estas tre profunda kaj havas vastan areon, tiel komence oni renkontis malfacilon en fiŝkaptado. Dank' al diligenta studo la fiŝistoj nun unuapaŝe mastris la leĝon de fiŝkaptado laŭ malsamaj sezonoj, klimatoj kaj profundeco kaj pliiĝis iom post iom la fiŝkaptanta kvanton. En 1972 la kvanto de kaptitaj fiŝoj de la gubernio Gjunhian, kiu situas proksime ĉe la akvokonservejo, atingis 600 tunojn, kio estas 150-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. La taga kvanto de kaptitaj fiŝoj de iu fiŝkaptanta taĉmento de la gubernio superis mil kilogramojn.

Nova atingo de ŝipkonstruejo


LA Ŝanhaja Ŝipkonstruejo enviciĝis inter la ŝipkonstruejoj de nia lando, kiuj kapablas konstrui dekmil-tonelajn ŝipojn.

Enirinte la ŝipkonstruejon oni povas tuj rimarki ĝian prosperecon: Jen kuŝas ĵus konstruita ŝipglitejo por dudekmil-tonela ŝipo kaj jen staras nova laborejo de dekmil-ĉevalpovaj dizeloj. Sur la ŝipglitejo brilas sparkoj de veldado, kaj ĉe la doko de la ŝipkonstruejo ankrumas du dekmil-tonelaj ŝipoj de ĝi mem projektitaj kaj konstruitaj...

La ŝipkonstruejo povas havi la hodiaŭan fizionomion pro tio, ke ĝi trapasis longan malglatan vojon.

Tiu ŝipkonstruejo havas historion de pli ol sepdek jaroj. Ĉirkaŭ duonjarcenton antaŭ la Liberiĝo, ĝi estis en la manoj de la kuomintangaj kompradoraj burokratoj kaj britaj kapitalistoj, tiam estis du malgrandaj ŝipkonstruejoj kun simplaj kaj malmodernaj ekipaĵoj. Ili neniam produktis ŝipon kaj kapablis plenumi nur riparajn kaj malkonstruajn laborojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ŝipkonstruistoj fariĝis mastroj de la lando kaj komencis ŝanĝi per siaj manoj ĝian postĝintan fizionomion en la spirito de penado en malfaciloj. kaj sur la bazo de ŝipriparado ili paŝo post paŝo fariĝis kapablaj konstrui mem ŝipojn. En 1958, la jaro de granda antaŭensalto, kuraĝigataj



Globforma steveno de dekmil-tonela ŝipo en muntado

de la ĝenerala linio de socialisma konstruado: **“Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, ili rompis superstiĉojn kaj liberigis siajn pensojn kaj konstruis sian unuan trimil-tonelan varŝipon kaj la unuan dumil-ĉevalpovan porŝipan dizelon depost la fondiĝo de la konstruejo.

Sed la aktiveco de la laboristoj por disvolvi la ŝipkonstruan industrion estis sufokita de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj. Elmetante la absurdaĵon de Liu Ŝaŭki “estas pli preferinde aĉeti ŝipojn ol konstrui, kaj ankoraŭ pli preferinde lui ol aĉeti”, liaj agentoj ĉiel sufokis la aktivecon de la laboristoj por mem konstrui ŝipojn kaj devigis la laboristojn konstrui nur 200- kaj 32-ĉevalpovajn dizelojn por ne paroli pri dumil-ĉevalpovaj. Poste al ili eĉ estis malpermesite konstrui 16-ĉevalpovajn. Sed la laboristoj ĉiam batalis kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de Liu Ŝaŭki.

La Granda Proleta Kultura Revolucio frakasis la burĝan komandojn estratan de Liu Ŝaŭki. Sub la stimulo de serio da instrukcioj donitaj de Prezidanto Maŭ pri energia disvolvado de la ŝipkonstrua industrio la laboristoj de la Ŝanhaja Ŝipkonstruejo nun klopodas por kontribui sian forton al la ŝipkonstrua industrio de la patrolando.

En la komenco de 1969, la laboristaro de ŝipkorpa laborejo la unua prezentis en la tuta ŝipkonstruejo la proponon pri memprojektado kaj memfarado de dekmil-tonela ŝipo. Kaj tiu iniciato tuj ricevis subtenon de la laboristoj de la laborejo por maŝinoj. La laboristoj deklaris: “Ni prenu sur nin la taskon konstrui dekmil-ĉevalpovan dizelon por tia ŝipo.” En la momento, la sindevigaj kaj garantiaj skriboj de la laboristoj de la aliaj laborejoj subtenantaj la proponon neĝflore flugis en la oficejon de la nove fondita revolucia komitato de la ŝipkonstruejo. Ankaŭ maljunaj emeritaj laboristoj rapidis por helpi informiĝinte pri la novaĵo. La laboristoj diris: “Antaŭ la Liberiĝo la de ni riparitaj ŝipoj estis de fremdaj landoj kaj ni vidis sur Huangpu-rivero nur fremdajn militŝipojn arogante naĝantajn. Tiam ni ne havis eblecon disvolvi nian propran ŝipkonstruan indus-

trion. Post la Liberiĝo niaj frataj ŝipkonstruejoj jam sukcesis fari dekmil-tonelajn ŝipojn kaj tion ankaŭ ni sopiras jam de longe. La revolucia komitato nepre sankciu la iniciaton!”


La supera instanco firme subtenis la proponon de la laboristoj, kaj oficiale inkluzivis ĝin en la produktan planon de la ŝtato.


Antaŭ tiu nova tasko la Ŝanhaja Ŝipkonstruejo, kiu okupis sin antaŭe ĉefe pri riparado, neeviteble renkontis multajn malfacilojn. Kion fari? Iuj opiniis: “La tasko estas asignita al ni laŭ la plano de la supera instanco, do ni postulu de la ŝtato provizi nin per novaj ekipaĵoj!” La laboristoj forte malaprobis tiun opinion kaj diris: “La tasko signifas konfidon al ni. Ni devas venki ĉiujn malfacilojn kaj krei necesajn kondiĉojn por plenumi la taskon, persistante pri la principo sinapogi sur la propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj, kaj neniam etendu manon helpopetan.”

Tiel dirite, tiel farite.

Por konstrui grandan ŝipon ĝenerale oni bezonas adekvate grandan ŝipglitejon. Sed la Ŝanhaja Ŝip-

Por prilabori grandajn maŝinpecojn de dekmil-ĉevalpova dizelo k.a., la laboristoj mem kreis grandan robotmaŝinon regatan de regebla silicio.





Poŭpo 107 tunojn peza en surakva renversado

konstruejo havis nur glitejon por trimil-tonela ŝipo. La laboristoj pensis, ĉu oni ne povas reformi ĝin? Ili ellaboris fidindan kaj efektivegeblan planon por reformi la ŝipglitejon kune kun gvidantaj kadroj kaj teknikistoj, post serioza analizo, esplorado kaj ripetada detala kalkulado. Poste oni solvis la kontraŭdirojn, kiujn oni alfrontis en konstruado de dekmil-tonela ŝipo sur la malgranda ŝipglitejo pro ĝiaj nesufiĉaj longeco, larĝeco kaj eltenkapableco de premforto, uzante nur uzitajn kaj disponeblajn materialojn.

Poŭpo de la ŝipo kunveldita apud la ŝipglitejo pezis 107 tunojn. Por ĝin levi kaj kunigi kun la ŝipkorpo sur la ŝipglitejo, la afero estas ne tiel malfacila por ŝipkonstruejo kun sufiĉaj ekipaĵoj. Sed la Ŝanhaja Ŝipkonstruejo posedis tiam nur unu levmaŝinon pordoforman kiu povas maksimume levi 40 tunojn. Tio estis granda malfacilo. Cetere, kiam oni konstruis la poŭpon, ĝi kuŝis kun kilo

supren, tiel ke antaŭ ol porti ĝin sur la ŝipglitejon por kunigi ĝin al ŝipkorpo, oni devas renversi ĝin antaŭe en la aero. Tio pli malfaciligis la laboron. Por eltrovi rimedon la pezlevaj laboristoj tuj kunvenis nokte. Ili diskutis varme kaj fine trovis bonan ideon: Oni prunteprenu cent-tunan flosantan gruon de frata fabriko, renversu la poŭpon en rivero helpe de la akva flosforto, kaj tiel faru la laboron ke la poŭpo post renverso falu sur speciale antaŭfaritan subtenan trabaron. Kiam tajdo flusas, oni ĝin tiru per vinĉo sur la ŝipglitejon. Oni faris ĉiujn antaŭpreparojn plej zorge kaj per tiu metodo sukcesis plenumi la taskon kaj tiel garantiis laŭdatan kunveldon de la partoj de la dekmil-tonela ŝipo.

Ankaŭ la maŝinkonstruaj laboristoj venkis ĉiujn malfacilojn dank' al sia sentimemo kaj kolektiva saĝo. Ekzemple la bazo de dekmil-ĉevalpova dizelo pezas 32 tunojn. Tiam la plej granda dukolona rabotmaŝino en la ŝipkonstruejo povis elteni maksimume premforton de 10 tunoj. La 32-tuna bazo premdetruus la rabotmaŝinon, por ne paroli pri prilaborado per ĝi. Tial iuj ekperdis sian fidon. Sed la rabotistoj ripetade faris esploradojn kaj praktikadon, kuraĝe malkonstruis la rabotmaŝinon kaj refaris ĝin en tiun kunmoviĝanta tranĉilo, per kiu iomete post iomete ili formis la bazon.

Venkinte diversajn malfacilaĵojn, post multaj neforgeseblaj tag-noktoj laborplenaj kaj dank' al la zorgado de la superaj instancoj kaj kunlaborado de multaj frataj unuoj la laboristoj de la Ŝanhaja Ŝipkonstruejo fine plenumis la taskon. En la antaŭvespero de la internacia laborfestado de la Unua de Majo, 1970, la unua dekmil-tonela ŝipo kun la nomo "Fenglej" triumfe surakviĝis. Samtempe ankaŭ la dekmil-ĉevalpova dizelo sukcesis funkcii en unufoja provo.

Jam pli ol tri jarojn la ŝipo "Fenglej" veturadis inter Ĉinio kaj Japanio kun totala veturdistanco de 50,000 marmejloj kaj dume ĝi trifoje renkontis en la maro ventegon 9-11-gradan kaj ĉiufoje restis sekura. Tio montris, ke ĝiaj strukturo kaj ĉefmaŝino tute bone trapasis la ekzamenon.

Tiel la laboristoj de la Ŝanhaja Ŝipkonstruejo elhakis sian vojon por disvolvi la ŝipkonstruan industrion. Dum la pasintaj kvar jaroj ili ne nur plenumis riparajn kaj produktajn taskojn, sed ankaŭ konstruis arojn da dekmil-tonelaj ŝipoj kaj dekmil-ĉevalpovaj dizeloj.

Nun la laboristoj kaj oficistoj de la ŝipkonstruejo klopodas por akiri novajn venkojn laŭ la larĝa vojo de sinapogo sur la propraj fortoj.

Feraj atestoj nemoveblaj kiel monto

— Rigardo al la reakcia esenco de Konfucianismo el la krimoj de Kong-familio

KJUFU estas la hejmloko de Konfucio, kies idoj loĝas en ĝia gubernia urbo, kaj ilia loĝejo estas nomata Kong-fu (fu signifas domon de mandarenoj). La reakciaj regantoj de diversaj dinastioj utiligis Konfucion por firmigi sian regadon kaj tial donis specialan favoron al la unuenaskitaj filoj de posteuloj de Konfucio en politiko kaj ekonomio. Feŭdisma imperiestro donis al ili heredan honortitolon “Janŝenggong”, tiel ke Kong-fu estis ankaŭ nomata “Janŝenggong-fu”, kiu formis grandan bienon de aristokrata terposedanto kaj havis nombron da oficistoj kaj diversajn jurajn privilegiojn kiel hereda “malgranda kortego”. Ĝi heredis ĉiujn tezojn de sia prapatro, sur la lipoj prikantas “*jen, ji, daŭ, de*” (bonkorecon, justecon, veron, bonmoralecon), dum en efektiveco ĝi faras kruelan ekspluaton kaj subpremado al la laboranta popolo. Feraj faktoj de la historio plene malkovris ke ĉio de Konfucio laŭdata de Lin Biaŭ, kiel “vero”, “bonmoraleco”, “bonkoreco”, “lojaleco kaj indulgemo”, estas nenio alia ol rimedo de ekspluato kaj rimedo por suĉi la sangon de la popolo, uzataj por trompi kaj mistifiki laborantan popolon, kaj reakcia spirita apogilo por protekti kaj firmigi la regantan pozicion de la ekspluata klaso.

SUBPREMADO KAJ MASAKRO KONTRAŬ LA LABORULOJ

Konfucio kutimis paroli pri “bonkoreco”, “bonmoraleco” kaj “amo” kiel “apliki bonmoralecon en regado”, “bonkoreco” estas “amo al homo” ktp. ktp. La reakciuloj de diversaj generacioj ĉiuj laŭdegis lin. Ekzemple, la faŝisma korifeo Ĉiang Kajŝek, kiu perfidas la nacion kaj turmentas la popolon, laŭdis Konfucion kiel “majstron de bonkoreco kaj justeco por jarmiloj”, kaj

“reprezentanton de la homeco por dek mil generacioj”; ankaŭ la renegato kaj naciperfidulo Lin Biaŭ energie laŭdegis Konfucion. Tamen, kiel ajn multajn laŭdojn la reakciuloj metu sur lian kapon, ne estas eble maski lian hipokritulan vizaĝon. Li pledis por subpremi la ribelon de sklavoj kaj treege malŝatis homojn progresemajn. Feraj faktoj atestis ke la bonkoran aŭ la bonmoralan politikon li aplikis nur al la sklavposedantoj, sed en neniuj okazoj al la vasta laboranta popolo, por kiu ĉiam estis nur kruela tretado kaj sanga buĉado.

Ĉio en kaj ekster “Janŝenggong-fu” klare montris ĉi tion. En ĝi funkciis juĝsalonoj ekstera, meza kaj interna. Laŭ la “arkivo de Kong-fu”, ĝi povis rekte alvoki farmiston, templan servutulon, domserviston kaj eĉ ĉiun familianon de Kong-fu aŭ kapti ilin por torturi kaj juĝi aŭ batpuni, se ĝi opiniis la koncernaton kulpa en tio aŭ alio. Ĝi provizis sin per diversaj torturiloj uzataj por torturi laborulojn kaj iam ĝi eĉ deklaris ke la bastonoj, vergoj ktp. estis donitaj de imperiestroj kaj ke ĝi estis libera de respondeco se per tiuj torturiloj ĝi mortigis homojn.

“Jenŝenggong-fu” havis krome tutan regadon kaj administran sistemon por protekti sian ekspluaton kaj regadon al la laboruloj. Krom ses departementoj estis ankaŭ kvardek oficistoj por la sankta templo, sub kiuj laboris centoj da dungitoj. Dum la tempoj de Ĉiang Kajŝek ĝi organizis eĉ “sanktan gvardion”.

Dum feŭdismaj dinastioj “Janŝenggong-fu” ricevis multajn privilegiojn tiel, ke ĝi povis akiri enspezojn per nomumo de oficistoj kaj superregi la guberniestron de Kjufo. De Tang-dinastio la guberniestran oficon ekkumulis idoj de Konfucio, de Ming-dinastio la ofico fariĝis hereda por Kong-

familio, tiel la tuta gubernio troviĝis sub la rigora superregado de “Janŝenggong”.

Dank’ al tiuj privilegioj “Janŝenggong-fu” sub la ŝildo de “klera kaj morala familio de la sanktulo” kruele persekutis la laborantan popolon simile al senkora burokrato. Ĝi rigardis la templon kaj tombejon de Konfucio, la monton Niŝan (lian naskiĝejon) kaj la monton Fangŝan, kie troviĝas la tombo de lia patro, kiel sanktejojn, kiujn neniu rajtis en-trudiĝi. Se iu tion faris, tiu ricevis punon en okazo malgrava, aŭ mortpunon en okazo grava. En printempo 1912, Kong Ĝaŭĝen, kiu sub premo de malsato kaj malvarmo, hakis kelkajn branĉojn el arboj de la tombejo de Konfucio, estis kaptita de la lakeoj de “Janŝenggong-fu” kaj batita ĝis duonmorto. Post tio li estis sendita al la guberniestra oficejo kaj rezulte Kong Ĝaŭĝen estis ligita per kol-kateno 25-30 kilogramojn peza kaj tirita por pilorie rondiri ĉirkaŭ la tombejo kaj en la ĉirkaŭaj vilaĝoj. Li pilorie rondiris unu fojon en ĉiu tago kaj tio daŭris pli ol tri monatojn, ĝis lia talio estis kurbigita kaj kripligita. Alia kazo: iutage de 1894, malriĉa kamparano Kong Giĉeng de la vilaĝo Lujan elfosis ŝtonon el sia kampo kvaron-kilometron fore de Niŝan. Sub la pre-

teksto ke tio ŝanĝis la terenon kaj damaĝis la *fengŝuj-on** de Kong-familio, li estis forte batita kaj malliberigita pli ol duonjaron. Por elaçeti lin lia familio devis vendi la solajn 5 muojn da kampo kaj infanojn. Jen estis ekzemploj de la “bonkora politiko” kaj “bonmorala regado” de Konfucio, kiuj estis fakte nur figfolio por kovri la reakcian sangan perforton kontraŭ la laboranta popolo kaj la vizaĝon de kontraŭrevolucia ekzekutisto.

Observante la volon de sia prapatro oponi kontraŭ “ribelo kontraŭ la superuloj” la “Janŝenggong-oj”, idoj de Konfucio, faris sangajn subpremojn kontraŭ kamparanaj leviĝoj komplotante kun la feŭdaj registaraj instancoj. Pretekstante gardi la templon de la prapatro ili devigis la popolon konstrui por ili defendajn remparojn, muregojn kaj fosajojn. Samtempe ili ordonis siajn subulojn en diversaj lokoj varbi kaj trejni vilaĝanojn por formi helpofortojn kaj subpremi la ribelulojn. Ĉiam kiam kamparanoj leviĝis al ribelo, ili tuj informis la registarajn instancojn, kontribuis al soldkaso, alvokis trupojn aŭ organizis reakciajn armitajn fortojn por masakri la ribelulojn helpe al la regulaj trupoj.

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Dongfeng komunumo, kiu estis vilaĝo de farmistoj de Kong-fu, kritikas Lin Biaŭ kaj Konfucion.



El la “arkivo de Kong-fu” oni eksciis, kiam la salfaristoj de la gubernio Siŝuj ribeliĝis en januaro 1721, “Janŝenggong-fu” tuj petis la registaron de King-dinastio sendi kavaleriajn kaj infanteriajn trupojn por garnizoni en Kjufu kaj ekspedis la garnizonantajn trupojn al Siŝuj por subpremi kaj furioze buĉi la ribelulojn. Kiam okazis la insurekcio de la “Tajping-a Ĉiela Regno” en 1851, “Janŝenggong-fu” ankaŭ sendis leteron al la Financa Ministerio kun kontribuo de tri mil uncojn da arĝento por financi la King-dinastion en sanga subpremado al insurekciaj trupoj. En 1853 kun Song Gipeng kiel la ĉefo oni organizis la religion Bajliangiaŭ en Zoŭhian-gubernio kaj levis ribelan standardon en 1860. En la fino de la jaro “Janŝenggong-fu” tuj sekrete anoncis tion al la aŭtoritato de Ŝandong-provinco, kaj tiu tuj sendis trupojn por subpremi ilin. En 1863 la ekzekutisto Senge-linkin persone komandis grandan armeon por sieĝi la bazlokon de trupoj de la religio. Granda masakrado okazis kaj la historio notis ke post tio “sennombraj osto amasiĝis kiel montoj”, “escepte de la nekompletaj, nombriĝis pli ol dudek mil kadavroj”. Tre multaj kamparanaj ribeloj dum la dinastioj de Ming kaj King estis subpremitaj de la registaro kun helpo de Kong-fu.

Krome “Janŝenggong-fu” komplotis kun la japanaj imperiistoj kaj kuomintang-aj reakciuloj por masakri sange la revolucian popolon. Laŭ la akuzo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Nankjuan-vilaĝo, kiam la japana agresa armeo invadis Kjufu en la komenca periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Kong-fu faris grandan bankedon por regali bonvenige la agresajn trupojn kaj loĝigi ilin en la vilaĝon Nankjuan, kiu plej forte oponis kontraŭ Kong-fu. La japanaj invadantoj faris ĉiajn fiaĵojn, tiel ke la pli ol 170 familioj de la tuta vilaĝo estis plene detruitaj kune kun sia havaĵo.

Tiuj sangmakulitaj faktoj evidentigis ke Konfucio kaj liaj idoj “Janŝenggong”-oj kaj ĉiuj reakciuloj kiel Lin Biaŭ k.a. en efektiveco uzas vergojn, bastonojn, glavojn, fusilojn kaj paflegojn por trakti la laborantan popolon, malgraŭ sur iliaj lipoj ĉiam pendas belaj vortoj kiel “bonkoreco, justeco, vero kaj bonmoraleco”, kaj ke iliaj “bonkoreca politiko” kaj “bonmorala regado” signifas nenion alian ol teroran regadon kaj masakron!

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“La ŝtatmaŝino ... estas la instrumento per kiu unu klaso subpremas alian. Por antagonismaj klasoj ĝi estas instrumento de subpremo, ĝi estas perforto kaj ne io**

‘humana’.” Lin Biaŭ kaj lia bando klopodas trovi el la armilrubejo de konfucianismo armilon por ataki la proletaron kaj kondamni la diktaturon de la proletaro “malbonkoreca”. Al tiuj atakoj kaj kulpigoj fare de reakciuloj Prezidanto Maŭ jam antaŭlonge kritikis: **“Jes, ĝuste tiaj ni estas. Al la reakciuloj kaj reakciaj agoj de reakciaj klasoj ni definitive ne aplikas humanan politikon. Humanan politikon ni aplikas nur interne de la popolo, sed ne al reakciuloj kaj reakciaj agoj de reakciaj klasoj ekster la popolo.”**

KRUELA EKSPLUATO, MORTIGOJ KAJ PERSEKUTOJ

Al kio strebis Konfucio eĉ en sonĝo, estis restaŭri la sklavan sistemon. Sed tio kion li buŝe kantadis, estis “riĉigo kaj bonstatigo de la popolo”.

Konfucio mem estis homo kun “mallaboremaj kvar membroj”, “ne povanta diferencigi la kvin grenojn” kaj vivanta kiel parazito, sed kun vivmaniero “ne rezignanta plejeban rafinecon de manĝaĵoj”. Unuflanke, li agrable parolis pri “riĉigo kaj bonstatigo de la popolo”, aliflanke li postulis ke la laboranta popolo “restu senplenda en mizereco”, kaj toleru sklavigon kaj subpremadon de ekspluatataj klasoj. Tio plene malkovras ke liaj belaj vortoj kiel “riĉigo kaj bonstatigo de la popolo” estis nenio alia ol trompa artifiko. La agadoj de “Janŝenggong-oj” kiuj heredis la instruojn de sia prapatro kaj elsuĉis la popolon, ankaŭ plene montris, homojn de kiu klaso Konfucio volis riĉigi kaj bonstatigi.

Prezidanto Maŭ diris: **“La feŭda reganta klaso — la bienuloj, nobeloj kaj la imperiestroj — posedis la plejparton de la tero, dum la kamparanoj havis tre malmulte aŭ tute ne havis.”** Tia estis efektive la fakto. “Janŝenggong-fu” estis bieno kun plej longa historio en la ĉina feŭda socio. En sia plej prospera tempo ĝi posedis agraron ĝis la amplekso de miliono da muoj (1 muo = 1/15 hektaro), lokitaj en kvin provincoj Ŝandong, Hebej, Henan, Giangsu kaj Anhuj. Laŭ enketo en la vilaĝo Hongmiaŭ de Kjufu, antaŭ la Liberiĝo el la 2,250 muoj da agroj en la tuta vilaĝo, 1,445 muoj apartenis al Kong-fu, 670 muoj al la tieaj bienuloj kaj kulakoj, nur 135 muoj (6%) apartenis al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

De kie venis tiuj agroj al Kong-fu? Ili estis rabitaj de kamparanoj laŭ jenaj rimedoj: 1, dona-

citaj de diversaj feŭdaj dinastioj, nome pere de imperiestroj; 2, aneksitaj profitante la okazojn de bankroto de kamparanoj; 3, okupitaj pere de lokaj oficistoj sub la preteksto de starigo de lernejoj aŭ plenumo de la regulaj oferritoj kulte al Konfucio; 4, rekte rabitaj de Kong-fu mem. Laŭ registro en "la arkivo de Kong-fu", en la jaroj de Hianfeng (1851-1861) de King-dinastio sub preteksto de kontrolado de agroj por oferritoj, Kong-fu aneksis agrojn ampleksantajn pli ol 320,000 muojn.

Tre kruelaj kaj multaj estis ankaŭ la rimedoj de Kong-fu por ekspluati kamparanojn.

La unua formo estis farmopago. Kong-fu havis multajn nomojn por siaj agroj: privataj, poroferaj, porbanaj, portualetaj k.a. Por pagi la terrentojn de tiuj agroj iuj estis en formo de greno, aliaj en formo de arĝento. La rento ĝenerale okupis 50-60% de la tuta rikolto. Sed pro diversaj aliaj rimedoj la fakte pagata rento eĉ multe superis la normalan.

La farmistoj estis ekspluataj per diversaj rimedoj krom la normala. Ekzemple, dum livero de rento la farmisto devis prezenti unu litron da greno por ekzameno, nomata "por ekzamena greno", kiu ne estis redonita. Dum mezurado, la greno estis verŝita en la mezurilon superplene ĝis formiĝo de pintaĵo super la randoj de la mezurilo, tiel ke multaj grajnoj falis eksteren sur la teron, kaj kiam la pintaĵo estis depuŝita per ligna tabuleto laŭ la randoj de la mezurilo, la greno forminta la pintaĵon falis sur la teron, tiuj grajnoj estis nomataj respektive "surtera kaj pintaĵa grenoj", kiuj jam apartenis al la oficistoj de Kong-fu, kaj la farmistoj mem ne rajtis repostuli. La lasta procedo estis enporti la rentogrenon en la tenejon, ankaŭ en tiu tempo la farmisto devis ŝmiri la grentenejan estron per agrablaj vortoj kaj por finplenumi komplete la devon de rentolivero sen pliaj obstakloj. Estis vere:

*Ĉe ĉiu paŝ' en Dom' de Kong-fu
prezentas sin ja malfacil',
de la unua ĝis la lasta, ĉiu
postulas sangon, larmon kun korŝir'.*

La dua formo de ekspluato estis devigaj "omaĝoj" kaj servoj truditaj al kamparanoj por kontentigi la bezonon de la putra vivo de Kong-fu. Estis tributuloj de persikoj, de abrikotoj, de anasoj, de fiŝoj ktp. por provizi manĝaĵojn; estis tributuloj de manĝujoj, kiel pladoj kaj teleroj, de balailoj, de artfajraĵoj, de buĉservoj, de boatservoj ktp.; estis krome specialaj tributuloj por diversaj servoj en okazo de oferaĵ, geedziĝaj kaj funebraj ceremonioj,

kiel blovistoj de kornoj, pezportistoj, porkobredistoj, bredistoj de oferbovoj kaj oferkaproj, dompurigistoj ktp. Ne mankis inter ili ploristoj, kiuj ploradis anstataŭ la familianoj de Kong-fu dum funebraj ceremonioj. Tiuj omaĝoj kaj servoj estis nerifuzible asignitaj kaj estis devige heredataj.

La tria formo de ekspluato estis ekstraj kontribuoj aŭ devigaj donacoj. Laŭ la registro en la "arkivo de Kong-fu" ĝi ĉiujare kolektis kiel starigita kutimo ekstrajn arĝenton, kotonon, teksaĵon, kokojn kaj porkojn. Unuvorte ĉiuj okazoj de jarŝanĝoj, festoj, geedziĝoj, funebroj, infannaskoj, datrevenoj de naskiĝtagoj en Kong-fu estis katastrofoj por la kamparanoj, sub ĉiuj elpenseblaj nomoj, al kiuj nenio mankis.

La kvara formo de ekspluato estis uzuro per jenaj kvar metodoj: 1, fondo de bankoj, kiuj pretendis faciligi la moninterŝanĝojn al vilaĝanoj kaj

En 1934, malriĉa kamparano Kong Hiangi prenis arbobranĉetojn el arbaro de la tombejo de Konfucio kaj ricevis baton de la lakeoj de Kong-familio ĝis krurorompiĝo. Nun li akuzas la krimon de Kong-familio al la junaj gekomunumanoj de Ĉengguan-komunumo.



grase profitis el la kurzo ĝis 20 %; 2, pruntedono de greno al kamparanoj dum la tempoj, kiam la lastjara rikolto jam forkonsumiĝis kaj la rikoltota estis ankoraŭ ne matura, por unu litro prunteprenita oni devis redoni post la rikolto du litrojn; 3, pruntedono de semoj kontraŭ duobla redono post rikolto; 4, pruntedono de bovo. Bovo valoranta ok uncojn da arĝento estis kalkulita dum pruntedono en valoro de 11 uncoj, la sumo estis redonenda en tri jaroj.

La kvina formo de ekspluato estis monopolo de foirejon por kolekti impostojn.

Krome ĝi vendis la 40 burokratajn oficojn asignitajn de feŭdaj imperiestroj al ĝi. La akirintoj de tiuj oficoj estis ĝenerale bienuloj kaj lokaj sinjoroj, kies mono finfine venis de la laboruloj.

Kia estis la vivo de siatempaj laboruloj sub tiuj ekspluataj metodoj? Laŭ enketo farita en la vilaĝo Hongmiaŭ, iam vivis 110 familioj en la tuta vilaĝo, inter kiuj pli ol 90 estis farmistoj de Kong-fu, vivante mizeran vivon, ke

*De l' kaduka domo oni povas vidi l' ĉielvolbon,
per ĉifonoj oni kovras sian korpon;
eluzita kuirpoto likas kvazaŭ korbo.*

En 1927 okazis katastrofo, tiel ke la kamparanoj rikoltis preskaŭ nenion, tamen, Kong-fu same postulis plenan pagon de rento sen ia cedo, kun minaco de puno. Rezulte de tio 85 familioj elmigris por vivteni almozpete, pli ol 30 familioj sume forvendis pli ol 60 infanojn, pli ol 70 personoj malsatmortis kaj 12 familioj pereis plene.

*Estas sango de mil homoj
la bongusta vin' en ora glaso;
kaj frandaĵojn en jadplado
formas gras' de l' dekmil uloj.*

Ĉu tio ne estis fera atesto ke la “riĉigo kaj bonstatigo de la popolo”, pri kio predikis la prapatro de la “Janŝenggong-oj”, ja signifis nur mortigon kaj persekuton al la popolo?

La predikoj de Konfucio havis klaran klasecon, ĝuste kiel montris Lusin: “Konfucio planis brilan projekton por regado de la lando, tamen, ĉio en ĝi estis metodoj elpensitaj por la interesoj de la aŭtoritatuloj kaj potenculoj, regantoj de la popolo, sed restis nenio por la popolo mem.”

La burĝa karieristo, konspirulo, kontraŭ-revolucia duvizaĝulo, renegato kaj naciperfidulo Lin Biaŭ same provis ornamu sin per la belaj vortoj de Konfucio pri “riĉigo kaj bonstatigo de popolo” por restaŭri kapitalismon. En efektiveco li volis


nur “riĉigi” la plenmanon da faligitaj bienuloj kaj kapitalistoj kaj “bonstatigi” la jam renversitan reaktan regintan klason.

EDUKI DAŬRIGANTOJN POR LA REAKCIA REGADO DE EKSPLUATA KLASO

La edukado, en analizo ĝis la fino, estas problemo por kiu klaso kulturaj talentuloj kaj daŭrigantoj. En klasa socio edukado ĉiam havas sian klasan karakteron. La edukado entreprenita de Konfucio celis kulturaj talentuloj por la klaso de aristokratoj-sklavposedantoj en servo al restaŭro de sklava sistemo. La kontraŭ-revolucia duvizaĝulo Lin Biaŭ, kiu igis sian filon kulti Konfucion kaj studi liajn klasikaĵojn, celis fondi faŝisman heredan feŭdan dinastion de Lin-familio, ambaŭ havis tre klaran klasecon.

La reaktiaj regantaj klasoj ĉiam laŭdis Konfucion kaj asertis ke lia tezo “regiona trejnado sen distingo de klanoj” estis eduki lernantojn el ĉiuj klasoj,

La elpendaĵo “Sanktula Domo” super la pordego kaj torturiloj uzataj de Kong-fu por puni laborantan popolon



kvazaŭ li estus “pedagogo de la tuta popolo”. Tio estas trompo. Fakte, tio estis reakcia rimedo de Konfucio por devige trejni laŭ regionoj sklavojn sen distingo de klanoj. Konfucio estis ĉiam mal-amika al laboranta popolo. Kiam lia disĉiplo Fan Ĉi petis lerni arton de terkulturado, li estis konsiderata de Konfucio kiel senindulo. La eduka penso de Konfucio estis “fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo”, la celo de edukiĝo estis fariĝi burokrato. Liaj disĉiploj estis idoj de aristokratoj kaj terposedantoj. La idoj de Konfucio heredis lian instruon kaj fondis lernejojn, kiujn vizitis ankaŭ nur idoj de bienuloj kaj riĉuloj. La filoj de la vastaj amasoj ja ne havis eblon viziti ilin.

Dum la longaj jaroj antaŭ la Liberiĝo regis en Kjufo-gubernio la fenomeno ke “antaŭ la domo de la sanktulo svarmas analfabetoj”. Laŭ statistiko en 1946, la gubernio Kjufo havis nur 84 elementajn lernejojn kun 4,000 lernantoj. La nuraj du mezgradaj lernejoj havis 500 lernantojn, el kiuj parto venis de aliaj gubernioj. La totala nombro de la lernantoj en tiuj lernejoj ne atingis 2% de la totala loĝantaro de la gubernio, kaj la lernantoj plejparte estis idoj de bienuloj, kulakoj k.a. ekspluatantoj. Tio ja estis nenio stranga, sed natura rezulto de la reakcia eduka linio de Konfucio. Post la Liberiĝo, la kulturaj kaj edukaj aferoj senĉese disvolviĝis sub la gvido de la Partio, precipe rapide disvolviĝis sub la gvido de la proleta eduka linio de Prezidanto Maŭ ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio. En 1973, en la gubernio troviĝis 411 elementaj lernejoj kun 77,434 lernantoj kaj 57 mezgradaj lernejoj kun 18,101 lernantoj. Tio montras, ke **“Kompare kun la ‘klasikaj libroj’ de Konfucio, la socialismo estas nekalkuleble pli bona.”**

La lernejoj de feŭda citadelo de Konfucio estis uzataj de diverstempaj dinastioj por kulturaj iliajn lakeojn. En la edukaj reguloj de la lernejoj estis skribitaj: “Eduki utilajn talentulojn por uzado de la kortego; la lernantoj ne forgesu danki la imperion

per sia kapablo.” Dum la pli ol 260 jaroj sub la regado de King-dinastio, en la gubernio Kjufo sukcesis en ekzamenoj por *ĝinŝi* (sukcesintoj en tutlanda ekzameno) 44 personoj, inter kiuj 33 estis el lernejoj fonditaj de Kong-fu. Dum la periodo de 1796 ĝis 1908, inter la 8 *hanlin* (sukcesintoj de kortega ekzameno) el Kjufo 7 estis lernintoj de lernejoj fonditaj de Kong-fu. Tiuj homoj fariĝis burokratoj super gubernia nivelo kaj subpremintoj de la laboranta popolo.

El la eduka praktikado de Konfucio kaj la celo kaj la historio de Kong-fu en fondado de lernejoj klare montriĝis ke “fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo” estis la kerno de la eduka penso de Konfucio. Ĉiuj ekspluatataj klasoj volis eduki por si burokraatojn kiuj tiranis la laborantan popolon, tial ili energie propagandis la reakcian edukan penson de Konfucio. La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki elmetis la teorion “kleriĝi por fariĝi burokrato” kaj Lin Biaŭ atakis la politikon de kamparaniĝo de junaj intelektuloj kiel “aliforman reformon per deviga laboro”, ambaŭ estis kopioj de “fariĝo de burokraatoj post sinklerigo” de Konfucio.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“Nia orientilo de eduko devas ebligi la edukatojn disvolviĝi ĉiufanke, morale, intelekte kaj korpe, kaj fariĝi laboruloj kun socialisma konscio kaj kulturo.”** Tiu orientilo plene diferencigis la edukon de la proletaro disde tiu de ĉiuj ekspluatataj klasoj kaj klare difinis la celon por la edukaj aferoj de la proletaro. Tio estas fundamenta elpaŝo por garantii ke la regpotenco de la proletaro neniam ŝanĝu sian koloron.

**Pseŭdoscienco, kiu priskribas la topografian medion de tereno, en kiu situas domo aŭ tombo, kaj kiu garantias la bonstaton kaj feliĉon de la loĝantoj aŭ la posteuloj de la entombigito, aŭ la topografia medio de tereno mem, en kiu troviĝas domo aŭ tombo.*



Neniam "indulgemon" al la klasaj malamikoj


de LI HINGMIN, maljuna ministro

POR uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj restaŭri kapitalismon, la burĝa karieristo, konspirulo Lin Biaŭ energie distrumpetis la herezaĵojn "bonmoralecon", "bonkorecon", "fidelecon kaj indulgemon" k.s. por freneze ataki la diktaturon de la proletaro.

Ni laboristoj opinias, ke Konfucio estis "bonkora kaj bonmorala" laŭ liaj vortoj, sed rabema kaj malvirta en la animo. Ankaŭ Lin Biaŭ estas tia ulo. La plaĉaj vortoj sur iliaj lipoj "bonmoraleco", "bonkoreco", "fideleco kaj indulgemo" estas nur trompo. Mi spertis la vivon en la malnova socio kaj profunde komprenis, ke la ekspluatataj klasoj neniam estis "bonkoraj" al la laboranta popolo. Antaŭvespere de Printempa Festo antaŭ la Liberiĝo, kiam mi estis 9-jara, neĝblovadis, estis ĝisoste malvarme kaj mia patro estis pelata en ŝakton. Pelate de malsato mi eliris kun almozula bastono kaj trua korbo kaj vagis en nokto. Fine mi venis antaŭ domon de la bienulo "Bonkorulo Li". En la domo oni drinkadis kaj distradis sin kaj tute ne atentis min. Sed kiam ili fariĝis sataj ĝis la gorĝo, tiuj kaptis ostojn kaj forte ĵetis ilin sur min. Mia kapo estis vundita kaj senĉese sangadis, sed la aĉuloj ekridegis. Kiam mi estis 14-jara, mi eklaboris sub ŝakto. Jen mi trafis el sub la pluvo en riveron. Foje mi puŝis ĉaron en galerio. Mi tute elĉerpiĝis pro malforteco kaj malsato. Sed submastro diris, ke mi sabotis, kaj svenigis min per

unu frapo de bastono. Poste li ĵetis min en kanaleton kaj foriris. Jen estis la "bonkoreco" kaj "fideleco kaj indulgemo" montritaj de bienuloj, kapitalistoj kaj iliaj lakeoj al ni laboruloj. Maljunaj ministoj ĝis nun klare memoras, ke antaŭ la Liberiĝo ĉe la aperturo de ŝakto staris Templo de Ŝakta Dio, en kiu pendis portreto de "Saĝulo Konfucio" kaj skribaĵoj "faru bonojn", "filantropio", "homamo" k.s. Tamen ni ministoj spertis nur katastrofojn kaj morton. Foje, antaŭ nia malsupreniro en la ŝakton kapitalisto incensis al la Ŝakta Dio kaj diris al ni, ke li "pie kultas la Ŝaktan Dion kaj respektas la saĝulon Konfucion", ke li "estas bonkoraj kaj homamaj". Sed antaŭ ol finiĝis lia parolo jam montriĝis lia diabla vizaĝo. Li ordonis submastrojn peli nin per vipoj en galerion kun densa mingaso kaj alta temperaturo. Tuj post eksplodigo de la dua mino eksplodis mingaso. Tiam la kapitalisto ne nur malpermesis savi la ministojn, sed male ordonis ŝtopi la tunelon, kaj multaj laboristoj mortis en ĝi. Post la akcidento la kapitalisto babilaĉis, ke "vivon kaj morton difinas la sorto kaj riĉecon kaj noblecon decidas la ĉielo". La bienuloj kaj kapitalistoj ja havas langon mielan, sed koron kruelan! Hodiaŭ ni proletaro kaj laboranta popolo radikale liberiĝis kaj praktikas diktaturon super la bienuloj kaj burĝaro. Kaj pro tio ilia agento Lin Biaŭ sentis grandan ĝenon. Sed kiel ajn freneze ili kriacas kaj blasfemas, ni neniam forlasos la karan defendan armilon — la diktaturon de la proletaro.

En la ekspozejo de ostoj de mortintaj laboristoj, ministoj kritikis la krimojn de Lin Biaŭ, kiu vane klopodis por restaŭri kapitalismon laŭ la doktrino de Konfucio "sinregi por restarigi la etiketon".





Soldato Li Gongven kritikis konfucianismajn babilaĉojn de Lin Biaŭ per sia familia historio.

La esenco de “bonkoreco” estas restaŭro

Verkita de subplotono de Ŝenjang-a Trupo de ĈPLA en kiu servis Lej Feng

“**B**ONKORECO” estas la kerno de la reakcia politika penso de Konfucio. Por restaŭri la kriman sklavsistemon, li elbakis kompletan doktrinon pri “bonkoreco” rompante al si la kapon. Por efektiviĝi sian lupan ambicion de restaŭro de kapitalismo, la renegato kaj naciperfidulo Lin Biaŭ fervore kolportis la reakcian teorion de Konfucio pri “bonkoreco”.


Ĉu la tiel nomata “bonkora” reakcia reganta klaso vere “amas homojn” en klasa socio? Tio estas nur trompaĵo. Ni rememoru la malfeliĉan knabecon de kamarado Lej Feng, la bona soldato de Prezidanto Maŭ. Antaŭ la Liberigo, en malpli ol 3 jaroj, la nigra malnova socio kaj la hommanĝa ekspluata sistemo forglutis 4 homojn de la familio de Lej Feng. Lia patro servis al kapitalisto kiel vektoportisto. Pro longtempa laciga laboro li malsaniĝis kaj mortis sputante sangon. Lia frato laboris por kapitalisto ekde la aĝo de 12 jaroj. La avida kapitalisto zorgis nur pri profito kaj neniam pri la sekureco de la laboristoj. Maŝino vundis al lia frato brakon kaj detranĉis liajn fingrojn. Konsiderante ke li ne povis plu labori, la kruela kapitalisto tuj elpelis lin el la fabriko, kaj la frato mortis pro la turmentado de la vundo. Ankaŭ lia unujara frato mortis en la sino de la patrino pro malsato kaj frosto. Lia patrino devis labori ĉe bienulo kiel servistino, kaj fine sin pendigis pro la subpremo de filo de la bienulo. Lej Feng fariĝis orfo en la aĝo de nur 8 jaroj. Li multe suferis de ofendo kaj subpremo de bienuloj. La sanga fakto montris al ni, ke ekspluato kaj subpremo estas instinktoj de bienuloj kaj burĝoj. “Sen mortigo al malriĉuloj oni ne povas riĉiĝi”, jen estas la kredo

de la bienuloj kaj kapitalistoj. Ilia tiel nomata “bonkoreco” fakte signifas hommanĝon. Konfucio kaj Mencio predikis, ke “bonkoruloj amas homojn”, tio estas mistifiko kaj trompo al la laboranta popolo. Ankaŭ Lin Biaŭ distrumpetis, ke “oni traktu homojn kun bonkoreco”, tamen tio absolute ne signifas ke li havas amon al la proletaro kaj la laboranta popolo, male li amas nur la bienulojn, kulakojn, kontraŭrevoluciulojn, fiulojn, dekstrulojn, imperiistojn, reviziistojn kaj reakciulojn.

Konfucio kaj Mencio multe babilaĉis pri “regado kun bonkoreco”, sed ili mem deŝiris de si la maskon per sia propra diro ke “etiketo ne estu aplikata al plebanoj kaj puno ne efiku al *dafu*-oj (superaj oficistoj)”. Tio signifas ke bonkoreco estis praktikata nur interne de la klaso de sklavposedantoj, sed ne al la sklavoj. Ili kalumniis sklavajn ribelojn kiel “malbonego por la mondo” kaj ĉiam klopodis plenergie por ilin subpremi. “Regado kun bonkoreco” predikata de Konfucio esence estas subpremo al la laboranta popolo kaj kontraŭrevolucia diktaturo de sklavposedantoj super sklavoj.

La esenco de lia “bonkoreco” estas restaŭro. Konfucio diris: “Sinrego kaj restarigo de etiketo celas bonkorecon; se foje sinrego kaj restarigo de etiketo estas efektivigita, ĉio sub la ĉielo submetiĝos al la bonkora reganto.” Tio montras, ke Konfucio ĉie predikis la doktrinon pri “bonkoreco” por nenio alia ol restarigi sklavan sistemon. Imitante Konfucion, ankaŭ Lin Biaŭ kriaĉis pri “bonkoreco” kaj lia krima celo estis restaŭri kapitalismon. Unuvorte, Lin Biaŭ volis restaŭri kaj retroiri. Jen la reakcia esenco de la tiel nomata “bonkoreco”.


Oceana ŝipo Fenglang en prova navigado



Ŝipkonstruejoj


apud

Huangpu-rivero



Alia oceana ŝipo Fengge projektita kaj farita de nia lando estas lanĉata.

Reguligo de la telekomunika sistemo




Kontrolo al la mezuraj aparatoj de la dizelo






Manipulistino de levmaŝino

100-tuna levmaŝino projektita de nia lando mem en muntado



Muntado de krankŝafto al 10,000-ĉevalpova dizelo






Muntado de radar-
aparato

Projektistoj en tri-
flanka kombiniĝo
studas plibonigitan
projekton de dekmil-
tonela ŝipo.






Muntado de másto



Muntado de helico




Muntado de funtubo





25.000-tonela flosdoko Huangšan



Pasaĝera ŝipo "Ĉangŝan"



Laboristoj irantaj laboro

Eminente arkopafistino

Vang Ven-gjuan

LA ŝanhaja 17-jara arkopafistino Vang Ven-gjuan rompis la mondan rekordon de 341 poentoj kreitan de polino en la virina 30-metra solronda arkopafado per 342 poentoj en la amikeca arkopafa konkurso okazigita en Kantono.

I

La laborista filino Vang Ven-gjuan estas lernantino de la ŝanhaja Hinbin-mezlernejo. Antaŭ pli ol unu jaro, ŝi komencis sin ekzerci en arkopafado. Pro malforteco de la korpo, ŝi renkontis multajn malfacilojn je la komenco. Poste ŝi serioze studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*, senkompate kritikis la reakcian teorion pri "genio" distrumpetitan de Lin Biaŭ, kaj per tio venkis sian eraran penson ke ŝi ne taŭgas por arkopafado, kaj firmigis sian memfidon pri la ekzerco. Poste, ŝi diligente lernis kaj pene ekzercis sin per ĉiam pli granda forto. Foje, en ekzercado de streĉo de arko trejnisto rimarkis ion nenormalan en ŝia movo. Li iris al ŝi kaj trovis, ke sur ŝia montrofinstro veziko estiĝis kaj sangis. Li admonis ŝin al ripozo, sed ŝi neniel volis. Post certatempa penema hardado, ŝi multe fortiĝis, povis tiri per unu spiro pli ol 50 fojojn la pezilon de pli ol 50 funtoj, kaj ankaŭ ŝia arkopafa tekniko multe altiĝis. En ĉifoja konkurso, krom la monda rekordo, ŝi rompis ankaŭ 7 landajn rekordojn kaj gajnis la virinan tutlandan ĉampionecon de kummetita individua konkurso.

II

Kvankam Vang Ven-gjuan iam partoprenis en unu aŭ du konkursoj antaŭ la ĉifoja konkurso, tamen al ŝi mankis sperto. Precipe dum la periodo de la amikeca konkurso la vetero de Kantono estis malserena, malvarma kaj humida, kaj blovis venteto. Ĉio ĉi tio servis kiel provo por la nova arkopafistino. En la unua tago, ŝi tro atentis la veteran kondiĉon kaj zorgis nur celadon kaj neglektis la

brakajn movojn, tiel ke ŝia tekniko ne estis plene disvolvita. Nokte, kamaradoj varme helpis ŝin resumi sperton kaj kuraĝigis ŝin liberigi sian penson, venki malfacilojn kaj krei eminentajn sukcesojn. Firme memorante la vortojn de la kamaradoj, malgranda Vang rompis la tutlandan rekordon de la 50-metra solronda konkurso en la sekvanta tago. Kaj en la tago de 30-metra solronda konkurso, Vang Ven-gjuan firme tenis en si la instruon de Prezidanto Maŭ **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon"**, por ne vanigi la esperon de la kompartia organizo kaj kamaradoj kaj klopodi por rompi la mondan rekordon.

III

Sur la konkursejo, Vang Ven-gjuan kun arko kaj sagoj en siaj manoj vivoplene staris sur sia pafloko. Ekfajfis startjuĝisto. Vang Ven-gjuan gracie levis horizontale siajn brakojn kaj aplombe streĉis la arkon. Jen la sago forlasis la kordon kun siblado tra la aero kaj rekte flugis en la centron de la cel-


La ĉina famekonata arkopafistino Li Ŝulan (la meza) kaj la trejnisto de la Ŝanhaja Arkopafa Teamo varme gratulas Vang Vengjuan pro ŝia eminenta sukceso.



tabulo. Ŝia unua pafado gajnis 10 poentojn. Poste, malgranda Vang sukcese pafis 33 sagojn de la unuaj 11 serioj kaj gajnis sume 314 poentojn, kio estis je 27 poentoj malpli multa ol tiu de la monda rekordo. Kaj tiam ĉe ŝi restis 3 sagoj de la lasta serio nepafitaj, tial por ŝi la espero rompi la mondan rekordon estos efektivebla. Tiam, ĉiuj rigardantoj turnis sian rigardon al ŝi kaj ĉiu ajn ŝia movo altiris ilian atenton. Jen ŝi tenis siajn ambaŭ kruojn en taŭgaj pozicioj, levis siajn ambaŭ brakojn fortikajn kun arko en unu mano kaj la alia mano streĉis la kordon. Tre gracia kaj preciza estis ĉiu el ŝiaj movoj. Sible

ŝi pafis du sagojn kaj gajnis 20 poentojn. Kiam la tria sago trafis la 8-poentan cirkon, la tuta spektantaro ekbolis de ĝojo. Oni svarmis al kaj intime manpremis kun ŝi por varme gratuli al ŝi la rompon de la monda rekordo.

Antaŭ la gloro, Vang Ven-gjuan fariĝis pli modesta kaj diskreta, kaj sin hardis ankoraŭ pli diligente. Ŝi decidis serioze studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, pluapaŝe starigi la ideon sinhardi por la revolucio, klopodi por krei eminentan sukceson kaj fari ankoraŭ pli grandajn kontribuojn por la fizikkultura afero de la socialisma patrolando.



ELEKTRONIKA INDUSTRIO DE ĈENGDU

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la elektronika industrio de Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉuan-provinco, disvolviĝis prospere. Nun la urbo jam havas dekojn da elektronikaj fabrikoj, kiuj produktas radioricevilojn, televidilojn, mezuraparatojn kaj aliajn entute pli ol 70 specojn da produktaĵoj. La Oka Ĉengdu-a Radioricevila Fabriko produktas ankaŭ malgrandan, malpezan, facile manipuleblan kaj ripareblan Universalan Elektronikan Komputilon de Tipo 16 kun marko "Ĉengdu". Elkreskis nova teknika vicaro de elektronika industrio, kiu mem projektis produktaĵojn kaj fariĝis la ĉefa forto en disvolvo de la elektronika industrio.

NOVA REKORDO DE KOTONA PRODUKTO

En Dali-gubernio de Ŝenhi-provinco estas avangarda kotonkultura grupo de

Ĝeng Lahiang. Escepte de unu maljuna kamparano-teknikisto ĉiuj aliaj 26 membroj de la grupo estas ordinaraj komunumanoj. Ili disvolvis revolucionan entuziasmon kaj aplikis sciencajn metodojn en terkulturado. En 1973 ili kulturis 3.5 hektarojn da kotono kaj ĉiu hektaro donis 2,438 kg. da kotono. La alta rekordo de kotona produkto prezentas la vastan perspektivon por plialtigi produktokvanton de kotono de norda Ĉinio.

GIMNASTIKOJ KONVENAJ AL DIVERSAJ PROFESIOJ

La laborpaŭza gimnastiko ĝenerale konvena al oficistoj kaj laboristoj antaŭ longe jam populariĝis tra la tuta lando. Antaŭ nelonge, laŭ la produkto kaj sanstato de laboruloj de fabrikoj, minejoj, financaj kaj komercaj entreprenoj, la Pekina Sporta Instituto projektis 7 gimnastikojn respektive konvenajn al metalurgiaj laboristoj, karboministoj, ŝoforoj, konstruistoj, komizoj kaj laboristoj de tekstilaj kaj elektronikaj fabrikoj. Disvastigate en iuj entreprenoj la gimnastikoj estas tre bonvenaj al la laboristoj kaj oficistoj.

Batalo ĉe Hiŝa-insularo



(Raporto en versoj)

PROLOGO

*Kanonoj tondras,
ŝvebadas pulvaj fumoj,
muĝas la Suda Ĉina Maro;
la tuta mondo
direktas la okulojn
al la heroa Hiŝa-insularo.
Tra l' ŝaŭm' de ondoj kaj nubar' en vento*

*ŝtormbirdoj ĵetas sin al blua l' firmamento.
Disfaldas ili laflugilojn
kun ardaĵ vol' kaj sento.
Ho flugu, vi ŝtormbirdoj!
tuj diru al ni,
kiel l' armeo kaj popol' de Hiŝa forbalais l' in-
vadantojn . . .*

I. LA BELA KAJ RIĈA HIŜA-INSULARO

*La suna lum' trembrilas sur la blua maro,
kaj vento ĵetas ŝaŭmajn ondojn al rokaro,
la sablo ore brilas,
ja blankan jardon la marbord' similas,
vidiĝas ĉie perlo-konkoj,
amasoj birdfekaĵaj altas kiel montoj.
Bredioj¹ verdaj
similas al ombreloj grandaj,*

*ŝafkornaj arboj
etendas sin rokfende kaj vojrande.
Sovaĝaj floroj nenombreblaj floras en prospero!
Ho ruĝaj, blankaj, bluaj, flavaj — kia bunta belo!
La klaraj fontoj ĉiam sukoni al bezon' liveras,
ĝi iom sala tamen dolĉas kiel mielo.
Ho, lakto de l' patria tero,
eĉ pro guteto da ĝi forto tuj aperas . .*

Ho!
vi, bela Hiŝa-insularo,
similas al plenman' da perloj
dise ŝutitaj sur la Suda Ĉina Maro.

En nia maro
jen fiŝoj naĝe ludas
kaj jen kaj jen elflugas
duope aŭ triope el l' ondararo;
hufoformaj konkvoj,
holoturioj dikaj
vidiĝas kvazaŭ en spegulo klara;
mar-pinoj, mar-salikoj
estas solidaj kaj fortikaj,
kaj la okulojn ravas la koraloj
per siaj brilkoloroj. La kvieta maro
similas al pecego da veluro
kaj kovras ja trezoron raran de l' naturo...

Ho, l' riĉa Hiŝa-insularo!
Vin amas la popolo,
avidas banditaro.

Ho! Hiŝa-insularo!
Vi, riĉa kaj tre bela,
imponas en la maro
simile al taĉmento sentinela

gardanta en l' ondararo
navigan vojon ĉe la lok' danĝera.

De antikveco Hiŝa estas jam nia teritorio,
prapatroj niaj lasis spurojn en tiu medio;
de kiom da generacioj
fiŝistoj niaj remis tien por rikoltoj,
ŝiparoj niaj ankris ĉe iliaj bordoj;
kaj oni trovis tie ĉinlingvan memorŝtonon²,
la tombojn de l' prapatroj,
Jongle-monerojn³,
bludesegnajn telerojn...
tra l' miloj da atestoj historiaj
ni kvazaŭ vidas tra muslino
la lumojn de antikvaj fiŝkaptistoj,
kuirajn fumojn de Han- kaj Tang-dinastioj
kaj velojn de Ming- kaj King-dinastioj...

Ho!
“Mil liojn longa sabla insularo,
mil liojn longa ŝtonbaraĵo”,
laŭdata en antikva kanto
ligiĝas strikte kun la kontinent' de l' patrolando;
Hiŝa, Nanŝa,
Ĝongŝa, Dongŝa⁴...
ho, ĉiuj estas belaj fiŝkaptejoj de la ĉin-nacio,
ĉu tolereblas al ili okupacio!

II. LUKTADO DE FIŜISTOJ KONTRAŬ MALAMIKOJ

Fiŝkapta ŝipo
rapidas tra la maro
vastega, spit' al vento
de Hiŝa-insularo
por kapti konkvojn,

holoturiojn, fiŝojn...
per retoj kaj fiŝhokoj,
kun plena energio,
kaj pretas por defendo de la loko...
Aŭskultu!

Sirenoj hurlas per lamenta tono,
jen sudvjetnamaj militŝipoj invadas nian maron!
Damnindaj pupoj de Sajgono
plene armite per pafiloj kaj kanonoj
kvazaŭ fieraj efemeroj dezirantaj skui arbon,
jen ili serĉas kolonion, fonton energian
por sia mastro anemia,
kaj volas la riĉfontojn niajn!
La bruston de la mar' jen la helicoj fendas,
kaj kvazaŭ brustan vundon la fiŝistoj sentas.
Ŝipestro A Ŝa, firma kiel roko,
tre alta kaj fortika,
kun manoj ĉe l' talio
atentis pri l' manovro malamika.
"Proteston!" tondris en ŝipkelo lia sono!
Hisiĝis tuj signala flago alte laŭ l' ordono,
montrante la indignon de l' popolo ĉina.
"Proteston pro l' invad' al nia maro!
For de ĉi tie je l' deklaro!"
Je la avert' eĉ time tremis ŝtalo,
kaj flanken turnis sin la militŝipa paro!
Sed l' arogantaj krimulaĉoj
eĉ faris fiaserton vanan
per signalflago: Hiŝa estas Da Nan⁵!
Jen venis ankaŭ la alia ŝip' rapide,
aktivis kune rabavide.
Ĉe l' pruo unu movis sin por baro,
l' alia jetis sin al la postaĵo,
kun fiintenco
dronigi la fiŝkaptan ŝipon apud Hiŝa-insularo!
Ŝipestro A Ŝa

naskiĝis en malriĉa la fiŝista familio,
kiu luktadas kun la maro de generacioj.
La fiŝtiran' mortigis pro impostoŝuldo lian patron,
patrin' graveda lia migris al Hiŝa en foro,
ĉe bordo de Hiŝa lin naskis sur boato,
kaj nomis lin A Ŝa por rememoro.
Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio
lin savis el mizero
kaj faris lin ŝipestro;
la ŝtormo de l' Kultur-revolucio
lin hardis tiel ke li kvazaŭ glavo
akriĝis pro aldon' de ŝtalo.
Vizaĝe al la invadantoj
A Ŝa la kapon alte levis:
"Rabistoj fiaj!
Vi revas nin dronigi en la maro!
Malfermu la okulojn
kaj vidu l' saĝon kaj bravecon de l' popolo ĉina!"
Je la mansvingo de ŝipestro A Ŝa,
la ŝip' facile ŝanĝis la direkton
kaj tiris sin el inter la du malamikaj
kaj per tri fajfoj
timigis la piratojn.
La malamikaj ŝipoj preskaŭ kunfrapiĝis.
Balanciĝante ili retroiris
kaj la hundaĉoj
insulte bojis unu al l' alia.
Ho, la heroa fiŝkapt-ŝipo
tirante post si l' malamikajn ŝipojn
kun ili kaŝludadis rondirante sur la maro,
simile al sagacaj gerilanoj en batalo
kun malamik' en sorgkamparo.

Post la unua malsukces' la malamiko
sin helpis tuj per dua artifiko:
en doganista uniformo pupa oficiro
kun nura feĉo de soldatoj
veturis al la ĉina ŝipo
fiŝkapta, en motor-boato.
“Kontrolon!” — krio la aeron fendis,
kaj la bandaĉoj ungojn tuj etendis
al nia fiŝkapt-ŝipa rando
samkiel cirkla klaŭna bando.
Ŝipestro A Ŝa levis la laŭtparolilon
por tuj malkaŝi l' ruzon de la malamikoj:
“Ĉi tie estas ne Sajgon-kazerno,
sed mar-teritorio de l' Ĉina Popola Respubliko!
Estas vi, kiuj devas esti kontrolitaj!
Tuj for de tie ĉi,
malkaŝaj vi banditoj.”
La malamikaj ŝipoj celis la kanonojn
al nia ŝip' kaj la banditoj de l' boato
minace la armilojn svingis. Tuj alarmajn sonojn
Ŝipestro A Ŝa donis — milicanoj por rebato
pafilajn siajn ŝargis kaj direktis
al brusto de la malamikoj:
“Kiu aŭdacos tuŝi nian ŝipon,
forhakos ni al li la ungojn pro l' praktiko!”
Ĉe unu flanko
fiŝistoj laboremaj kaj honestaj,
kaj aliflanke,
lupoj ĝisdente kirasvestaj!
Pretigis l' armilaro
por tuja ekbatalo

sur la muĝanta maro!
La ŝtalaj milicanoj,
simile al Liulian-montoj⁶,
ne ŝanceliĝis eĉ en uragano.
Por la hero' ŝipestro A Ŝa,
kolono en la suda mondo,
ja sensignifa estis la luparo aĉa!
“Se la banditoj eĉ aŭdacos ekbombardi,
ni sturmos al ĝi
por mortbatali
kaj nian mar-teritorion gardi!”
Je aŭdo de la vortoj la pup-armeanoj
paliĝis kaj ekstremis iliaj piedoj kaj la manoj.
Kapitalistoj vere sangmakulan monon havas,
sed viroj aĉetitaj en batal' malbravas.
Ja justas la popolo!
Kun nefleksebla volo,
kuraĝa, firma koro,
kaj fideleco al revolucio,
brilega kiel sunradio,
ĝi staris batalpreta sur la maro muĝa
kiel Li Juhe⁷ alte kun signal-lanterno ruĝa!

(daŭrigota)


NOTOJ

1. *Bredia hirsuta* — speco de tropika ĉiamverda arbeto.
2. Sur la Norda Insulo oni trovis memorŝtonon kiu portas surskribon signifantan “Memore al la inspekto en la 28-a jaro de Guanhju-regperiodo, Granda King-dinastio”.

3. Niaj armeo kaj popolanoj trovis sur la Korala Insulo monerojn de Jongle-regperiodo (1403-1424) de Ming-dinastio, antikvajn ĉinajn telerojn k.a. historiajn restaĵojn.
4. La ĉinaj insularoj Hiŝa, Nanŝa, Ĝongŝa kaj Dongŝa ĉiuj troviĝas en la Suda Ĉina Maro.
5. Dan Nan, grava havenurbo de Sudvjetnamio

en la provinco Quang Nam.

6. Liulian-montaro troviĝas sur Hajnan-insulo de ĉina Guangdong-provinco.
7. Li Juhe, heroo en la revolucia moderna pekina opero *Ruĝa Signal-lanterno*, estas fame konata tipo de proleta heroo.




Sur Hiŝa-insularo

Nova eldono de

“Noveloj de Lusin” (plena kolekto)

estas ĵus aperigita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. La nova eldono enhavas ankaŭ la kvar pecojn mankantajn en la unua eldono en 1963, do ĝi fariĝis la kompleta kunigita eldono de la tri novel-kolektoj kompilitaj sisteme de la aŭtoro mem. La libro havas 488 paĝojn kaj 18 ilustraĵojn en apartaj paĝoj el lignogravuro; tiu arto laŭ la eŭropa maniero estis enkondukita de Lusin en Ĉinion en tridekaj jaroj. Krome estas portreto kaj unu faksimilaĵo el manuskripto de la aŭtoro. Kronologiaj notoj pri la aŭtoro estas aldonitaj por faciligi al la legantoj ekkoni la vivon kaj laborojn de la aŭtoro.

Lusin debutis kiel novelisto en 1918 estante radikala revolucia demokrato kaj estas rekonata fondinto de la moderna ĉina literaturo. Kun la evoluado de la ĉina revolucio, li turniĝis en marksisman literaturiston. Liaj verkoj ĉiam havis intiman ligitecon kun la epoko. Prezidanto Maŭ tre alte taksis Lusin. En la verko *Pri Nova Demokratio*, li skribis: **“Lusin estis la plej granda kaj la plej kuraĝa standardportanto de tiu ĉi nova kultura forto. Kiel la ĉefgeneralulo de la ĉina kultura revolucio, li estis ne nur granda literaturisto sed ankaŭ granda pensulo kaj granda revoluciulo. Lusin estis homo kun plej malmolaj ostoj kaj sen ombreto da sklava mieno aŭ flatemo; kaj tio**



estas la plej valora kvalito por la koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj. Sur la kultura fronto, Lusin estis la plej ĝusta, plej kuraĝa, plej firma, plej lojala kaj plej arda nacia heroo senprecedenca en nia historio, kiu reprezentis la plejparton de la tuta nacio kaj brave breĉis kaj sturmis la malamikan batalvicaron. La direkto de Lusin estas tiu de la nova kulturo de la ĉina nacio.”

La unua eldono sisteme rikoltis tre grandan favoron ĉe la recenzoj de la esperanta gazetaro. Ni kredas, ke la nuna eldono ricevos ankaŭ varman akcepton de la legantoj. La libro estas bindita kun surkovrilo kaj silka paĝoŝnureto. Prezo: £ 0.83, Gld. 8.35, US\$ 2.30, Yen 830. Ĝi estas aĉetebla ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio, aŭ ĉe niaj perantoj diversaj en landoj.

Tri Meksikiaj Esperantistoj Faris Amikan Viziton al Ĉinio

En la unua tagdeko de aprilo la delegacio de meksikiaj advokatoj faris amikan viziton al nia lando. En la delegacio troviĝis tri esperantistoj — D-ro Pedro Magana Erosa, lia filino S-ino Margarita Elena Magana Sanchez kaj S-ro Hugo Huacuja. Kiam ili restadis en Pekino, Ĉen Juan, sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj esperantaj laborantoj de *El Popola Ĉinio* kaj la Libroservo de ĈEL intervidiĝis kaj havis agrablan kaj amikan interparolon kun ili, kiuj unuafoje vizitis

nian landon. Ili diris, ke ilin profunde impresis la bela lando Ĉinio kaj la sukcesoj akiritaj en nia socialisma konstruado. S-ro Pedro estas veterana esperantisto kaj faris sian kontribuon por amikeco de esperantistoj de Ĉinio kaj Meksikio, tial la vizito de D-ro Pedro kaj lia filino S-ino Sanchez havigis al ni ŝancon vivi en intimeco kun ili. Krome, gekamaradoj de EPCĉ akompanis la gastojn en la ekskurso al la Granda Muro kaj Dingling-maŭzoleo.

Zorgema servo al klientoj

EN fabriko de ilmaŝinaj akcesoraĵoj de la urbo Jingkoŭ de Liaŭning-provinco kelkaj kamaradoj interparolis mimike kun mutaj laboristoj. Ili estas komizoj de la proksima flankmanĝa vendejo Fanĵong. Por kontentigi vivbezonojn de pli ol 80 mutaj laboristoj de la fabriko, ili aparte alvenis por kolekti iliajn opiniojn. Tiuj komizoj ofte vizitis proksimajn loĝkvartalojn kaj fabrikojn aŭ invitis amason al sia vendejo por peti iliajn opiniojn kaj scii iliajn vivbezonojn. Ilia zorgema servo estas ofte laŭdata de amasoj.

POR BEZONO DE LA AMASOJ

Priparolante flankmanĝajn vendejojn, oni nature ekpensas en ĝi vendadon de oleo, salo, sojsaŭco, vinagro, fiŝoj, viandoj, ovoj kaj legomoj, kiuj estas malmultekostaj, sed tre bezonataj de la amasoj. Dum la Granda Proleta Kultura Revolucio, la partia organizo de la vendejo aparte atentigas la servan direkton de komerca laboro kaj konstante faras edukon al siaj komizoj ligante la problemojn aperintajn en la laboro por senĉese altigi ilian konscion tutanime servi al la popolo.

Foje, iu laboristo volis aĉeti iometon da peklita legomo. Komizo trovis la aĉetan kvanton tro malmulta kaj ne volis vendi ĝin. Post tio, kompartiano kaj estro de la vendejo Jang Giaŝan vespere demandis la komizon, kial li ne volis vendi ĝin al la kliento. La komizo malkontente respondis: "En tagmezo mi estis tre okupata, li ĝenis min pro iometo da peklaĵo!" Aŭdinte tion, kamarado Jang Giaŝan sentis grandan maltrankvilon. Li pensis en si ke la komizo ne konsideras aktualan bezonon de amasoj, timante ilian ĝenadon. Kiel oni povas bone entrepreni socialisman komercon kun tia penso? En la sekvanta tago li kun kelkaj komizoj vizitis proksiman fabrikon. Laboristoj diris: "En somero estas varme, ni volas manĝi iometon da peklaĵo, sed vi ne volis vendi tion." Reveninte, ili varme diskutis pri la opinioj de laboristoj, kaj multaj kamaradoj diris: "La flankmanĝa vendejo devas provizi milojn da familioj per vivbezonaĵoj. Ĉiu el niaj

laboroj havas intiman rilaton kun vivo de vastaj amasoj kaj devas kontentigi la konkretajn bezonojn de amasoj. Neglektinte tion, ni ne povas plenumi nian devon." Post diskutado, ili altigis sian konscion kaj decidis bone fari la laboron laŭ bezonoj de la amasoj.

La kamaradoj de la spicaĵa grupo de la vendejo preparis teleretojn kun kelkaj miksitaj peklaĵoj, por ke laboristoj povu aĉeti ilin per kelkaj cendoj. La kamaradoj de la vianda kaj ova grupo prilaboris en sia ripoztempo viandon en tranĉaĵon kaj farĉaĵon por doni oportunecon al amasoj. En la lastaj jaroj la vendejo difinas sian servan tempon laŭ malsama sezono kaj bezono de la amasoj. Prin-tempe, kiam granda kvanto da freŝaj fiŝoj kaj sali-

Por doni oportunon al klientoj, ili portas legomojn en ilian hejmon.



kokoj estas liverata al la vendejo, la komizoj de la vendejo ofte laboras ĝis profunda nokto por ke oni ĝustatempe povu aĉeti ilin, kaj iam komizoj eĉ puŝas ĉareton da tiuj freŝaĵoj al domoj de loĝantoj. En malfrua aŭtuno, kiam granda kvanto da brasikoj estas transportata al la vendejo, ili alterne deĵoras en diurno por ke la loĝantoj sufiĉe konservu brasikojn por vintra konsumo. Klientoj laŭde diris: "La komizoj de la vendejo Fanĵong ĉiam tenas en sia koro servon al la popolo."

ENKETI PRI BEZONOJ DE KLIENTOJ

La laborantoj de la vendejo ne estis kontentaj je siaj atingoj en laboro kaj senĉese prezentis al si pli altan postulon. Iun tagon, komizino Guo Hujhia trovis, ke onklino Gaŭ kiu ofte frekventas la vendejon por aĉeti manĝaĵon ne alvenis en la lastaj tagoj. Vespere post deĵoro, ŝi venis al la hejmo de onklino Gaŭ. La onklino estas maljunulino sen gefiloj kaj kuŝis sur lito pro malsano, la revolucia komitato de loĝantaro aĉetis bezonaĵojn por ŝi en la lastaj tagoj. Malgranda Guo tuj faris por ŝi dommastruman laboron kaj poste revenis hejmen. La sekvantan tagon ŝi raportis la aferon pri onklino Gaŭ al la gvidanto kaj kamaradoj. Aŭdinte tion, la lastaj sentis ke ili ne plenumis sian devon. Iuj kamaradoj diris: "Por pli bone fari la laboron, ni devas enketi pri la bezonoj de niaj klientoj." De tiam la gvidanto de la vendejo mobilizis la laborantojn fari detalan enketadon al la proksimaj loĝantoj kaj fabrikoj. Ili trovis, ke ĉirkaŭ la vendejo troviĝas pli ol 30 familioj de maljunuloj, malfortuloj, malsanuloj kaj kripluloj kaj havas malfacilojn en aĉetado de bezonaĵoj, tial oni devas doni apartan helpon al ili, kiujn la komizoj registris en libreton. Poste, ĉiam, kiam venas festotagoj aŭ

liveriĝas freŝaĵoj al la vendejo, la komizoj portas ilin respektive al tiuj familioj. Por favorigi geedzojn ambaŭ laborantajn ili starigis matenan kaj vesperan servon kaj iniciate tenas por ili malplenajn botelojn, por ke ili post laboro povu preni ilin kun sojsaŭco kaj vinagro sur la hejmenrevena vojo. Por ke iuj loĝantoj malproksimaj de la vendejo povu proksime aĉeti urĝe bezonatajn flankmanĝaĵojn, ili ankoraŭ starigis malgrandajn agentejojn.

Dum la enketado, ili trovis ke tie loĝas ĉirkaŭ 100 familioj de sudanoj kiuj ŝatas manĝi sudajn legomojn. Sub helpado de koncerna unuo ili mendis de aliaj lokoj *zacaj*-ojn (*Brassica juncea var. tsatsai*), bambuĝermojn kaj freŝajn lotusradikojn kaj per tio kontentigis la bezonon de la sudanoj.

NE TIMI ĜENON POR LA POPOLO

La vendejo situas en plenloĝata loko kaj proksime de aŭtobusaj stacioj kaj ŝipa doko. Ĉar la vendejo abundas je komercaĵoj de multaj specoj tial ĝi ĉiutage havas tre multajn klientojn. En festoj aŭ ferioj klientoj svarmas en kaj ekster la vendejo.

La kamaradoj de la vendejo havas komunan deziron: Pli da oportuneco al la amasoj signifas pli da kontribuo por socialismo. Sekve ili senĉese plimultigas siajn taskojn kaj iniciate faras tiujn laborojn kiuj ne apartenas al ilia plenumata tasko.

En vintro, ili rimarkis, ke laminario ne estas multe aĉetita de klientoj. Ĉu oni ne ŝatas ĝin manĝi? Petinte opiniojn de klientoj, la komizoj sciis ke en vintro laminario estas seka kaj malmola kaj bezonas multan tempon por trempadi ĝin en akvo, tial ili ne volis ĝin aĉeti. La kamaradoj de

Servoĉaro trovas bonvenon de amasoj en la loĝkvartalo.



akvoproduktaĵa grupo trempadis laminaron en akvo kaj tranĉis ĝin en striojn, kio estis tre oportuna por amasoj.

En legoma sezono de iu jaro, kiam multaj brasikoj estis transportitaj al la vendejo kaj amasigitaj en kaj ekster la vendejo, la komizoj okupiĝis tage kaj nokte por ke amasoj konservu pli multe da brasikoj. Iun tagon komizo de la vendejo persvadis junan laboriston konservi pli multe da brasikoj kaj tiu respondis: "Mia malgranda familio ne havas tempon por acidigi brasikojn." La komizoj opiniis ke la vortoj de la laboristo estas pravaj,

kaj tuj decidis aldoni taskon trempi brasikojn en bolanta akvo por amasoj. Post kiam la servo estis afiŝita, klientoj vizitis la vendejon unu post alia por peti servon de mateno ĝis vespero. Ili ĝoje laŭdis: "Bone! Bonege! Tio ŝparis kaj tempon kaj karbon."

La vendejo faris multajn similajn servojn. Laborantoj de la vendejo ofte diris: "Ni volas multe labori por la popolanoj, kaj malfacilaĵoj kaj laciĝo en revolucia laboro por ni signifas feliĉon!" Nun, ili pli fervore laboras por bone plenumi la taskojn asignitajn de la Partio en servo al amasoj.



Laborantoj de la butiko ofte invitas al si laboristojn kaj loĝantojn por peti opiniojn.



Varma servado al klientoj

Higienaj laboroj en kamparo

ANTAŬ nelonge ni faris viziton al Giŝan-gubernio en la sudokcidenta parto de Ŝanhi-provinco.

HIGIENEMO FARIĜIS KUTIMO

Ĉiun matenon, la loĝantoj de Tajjang-vilaĝo de Tajjang-komunumo, ĉu blankharaj maljunuloj aŭ infanoj kun ruĝa kravato, ĉiuj konkure faras balaadon. "Per matena duon-horo, ĉiu familio faras purigon", tio jam fariĝis kutimo de la vilaĝanoj.

Ni faris intervjuon kun Liu Likjuan, komunumano nun 45-jara. De la jaro 1962 li transprenis de alia komunumano la laboron de purigo de parto de strato kaj li neniam interrompis sian plenumadon de tiu tasko. Krom la strata purigo li balaas neĝon vintre kaj riparas la straton post pluvo. Farante tion li tamen neniam preterlasis partoprenon en kampaj laboroj de la kolektivo. Ni ankoraŭ vizitis la hejmojn de aliaj komunumanoj kaj vidis ilin puraj kaj bonordaj. 82-jara komunumano Vang Cuj-e estas bonfarta kaj tenas por si la honoran titolon de higienema modelo jam 20 jarojn. Ŝia familio havas bonan kutimon higienan kaj ŝiaj gefiloj kaj genepoj ĉiuj vivas sane.

La komunumanoj, kiujn ni vidis, ĉiuj portas purajn vestojn. La staloj por jung-brutoj kaj porkoj, bredejoj de kokoj kaj necesejoj estas reformitaj, kaj tenataj en pureco. La vilaĝanoj jam starigis al si novan kutimon de higienemo. Brigada kuracisto diris al ni, ke ili ĉiujare injektas aŭ donas al la komunumanoj medikamentojn por preventi malsanojn, faras al ili medicinan ekzamenon en difinita tempo kaj starigis por ĉiu homo sanstatan karton kaj al ĉiu familio sanstatan arkivon.

La patriota higiena movado persiste disvolvata en Tajjang-vilaĝo ŝanĝis ne nur la objektivan mondon sed ankaŭ la subjektivan mondon de la vilaĝanoj. Multaj homoj liberiĝis el superstiĉo kaj ekkredis higienan sciencon. 50-jara komunumano Han Ĝanĝiu naskis nur unu infanon en la 20 jaroj post sia edziniĝo, sed ĝi vivis apenaŭ monaton. La tezo de Konfucio "Morto kaj vivo estas destinita de la sorto kaj riĉiĝo kaj nobeliĝo estas decidita de

la ĉielo" havis certan influon al ŝi. Ŝi deprimiĝis pro sia negravediĝo. En 1952 Tajjang-vilaĝo disvolvis patriotan higienan movadon, la brigada higiena stacio kuracis al ŝi virinan malsanon kaj ĉiam pli boniĝis ŝia sano. En 1959 ŝi naskis dikan bebon kaj de tiam ŝi ne plu kredas la sensencaĵon de Konfucio.

De multaj jaroj oni malofte vidas muŝojn, moskitojn, cimojn kaj ratojn en la vilaĝo. Oftaj malsanoj multe reduktiĝis kaj la saneca nivelo de la komunumanoj multe altiĝis. Komunumano Duan Ĉeng-e vivis 106 jarojn. Tio estas maloftaĵo en la vilaĝo.

La higienaj laboroj de la komunumanoj ebligis al la brigado kolekti grandan kvanton da sterko, kio stimulis la produktan disvolviĝon. En 1973 la produktokvanto de greno de la brigado preskaŭ kvarobliĝis kaj tiu de kotono triobliĝis, kompare kun tiuj de 1952.

FORIGO DE MILJARAJ MOROJ

La patriota higiena movado forigis miljarajn malnovajn morojn kaj kutimojn kaj iom post iom formis novajn socialismajn morojn.

En Nanliang-brigado de Zedian-komunumo, iuj virinoj kun aĝo de pli ol 50 jaroj rakontis al ni sian doloran sperton de akuŝado en la juneco. Tiam la akuŝintinoj devis sidi sur terlito kaj estis permesate al ŝi nur trinki maldensan kaĉon en duonmonato post la akuŝo. . . Oni diris ke la akuŝo similas al trapaso de infera pordo. Nun, kiam junaj virinoj aŭskultas tiun rakonton, ili diras kun rido: "Ho, eĉ estis tia afero! La rakonto impresas nin kvazaŭ fabelo!"

Jes, tiaj malnovaj moroj estis jam forĵetitaj kiel balaaĵo en rubejon. En 1953 Nanliang-brigado disvolvis la patriotan higienan movadon kaj samtempe disvastigis novan metodon de akuŝigo, de tiam la akuŝintinoj ne plu suferas la malnovan turmenton kaj la sano de la patrino kaj bebo estas garantiata. De 1963 ĝis 1973, en la brigado naskiĝis 298 beboj, el kiuj tri mortis, kaj la akuŝintinoj fartis bone.

Ankaŭ la miljara penso “kun pli multaj filoj oni ĝuas pli multan feliĉon” estas forĵetita pro efektiviĝo de laŭplana infan-nasko. Ni vizitis 36-jaran komunumaninon Ĝoŭ Guĵlian. Ŝi naskis filinon en 1962, kaj poste respondante al la alvoko de la Partio, ŝi prenis al si metodon de prevento de gravediĝo. Post 10 jaroj ŝi naskis filon kaj nun ankoraŭ praktikas la preventan metodon. Pro malmulteco de mastrumaĵo kaŭzita de la infanoj, ŝi ĉiujare povas labori pli ol 300 tagojn en la brigado kaj persisti en lerno de politiko kaj legoscio, tial ŝia politika konscio altiĝas rapide. Ŝi ĝoje diris: “La laŭplana infan-nasko estas utila al la produktado, lernado kaj sano.” Dank’ al propagando de malfrua geedziĝo kaj laŭplana infan-nasko, la procento de loĝantara pliigo reduktiĝas jaron post jaro.

En 1967 de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la partia filio de Nanliang-brigado organizis kamparajn kuracistojn por fari ĝeneralan medicinan ekzamenon al la pli ol 1,000 loĝantoj de la vilaĝo. La ekzameno pruvis ke multaj vilaĝanoj estas suferantaj de askaridozo. La brigado do okazigis higienan ekspozicion por ke oni persone vidu per mikroskopo ovojn de parazitaj sur freŝaj legomoj, en akvo kaj fekaĵo. Tio donis al la vilaĝanoj vivan edukon pri higieno. Post tio, la partia filio mobilizis la amasojn reformi la necesejojn, forbalai rubaĵojn kaj trakti fekaĵon per fermentado. De tiam la komunumanoj ŝanĝis la kutimon trinki neboligitan akvon kaj manĝi nekuiritan legomon kaj malsanoj multe reduktiĝis.

NOVA FIZIONOMIO DE KAMPARO

Ni vizitis ankaŭ Nansonghe-brigadon de Kinghe-komunumo en la sudorienta parto de Giŝan-gubernio. Tiu izolita vilaĝeto hodiaŭ rapide ŝanĝas sian fizionomion medicinmankan.

La vilaĝo komencis la patriotan higienan movadon ekde 1952. Tiam 21-jara Liu Jumin estis la unua kuracisto en la vilaĝo. Kunportante medikamentan keston li laboris surkampe kaj samtempe kuracis ordinarnajn malsanulojn. Poste li kulturis du kamparajn kuracistojn. En 1959 tiu brigado efektivigis kooperan kuracadon. Nun ĝia kuracejo havas pli ol 150 ĉinajn drogojn kaj pli ol 200 okcidentajn medikamentojn. La ordinarnaj malsanuloj povas esti kuracataj en la vilaĝo. Dank’ al serioza efektiviĝo de la principo **“Prenu preventon kiel la ĉefan metodon”**, en la lastaj 13 sinsekvaj jaroj tie neniam okazis epidemioj kiel morbilo, disenterio kaj B-encefalito.



Hospitalo de Tajjang-komunumo



Matena balaado

Parolante pri la hodiaŭa feliĉa vivo, komunumanoj, nature rememoris la mizeran pasintecon. Antaŭ la Liberiĝo kiam vilaĝano malsaniĝis, oni ne povis trovi por li kuraciston eĉ piedirinte kelkdek liojn kaj trans montojn. 62-jara Sun Kifa diris al ni, ke lia edzino naskis sep infanojn antaŭ la Liberiĝo, kiuj ĉiuj mortis de malsano pro manko de kuracado. Post la Liberiĝo lia edzino naskis kvar infanojn, kaj ili ĉiuj nun kreskas sane. Kuracisto de la kuracejoj Hing Ŝujuan diris al ni, ke de 1966 ĝis 1973 naskiĝis 127 infanoj en la vilaĝo, el kiuj 124 nun sane kreskas. Ĉiuj 171 produktaj brigadoj de Giŝan-gubernio havas sian kuracejon kaj starigis kooperan kuracadon. Ankaŭ la trupo de kamparaj kuracistoj kreskas senĉese. Ili persistas en sinapogo sur la propraj fortoj, diligente kaj ŝpareme entreprenas medicinan aferon. Ili mem kolektas kaj kulturigas drogherbojn, kaj mem faras medikamentojn, kio multe akcelas la disvolviĝon de la kooperata kuracado.

Familio de komunumano

KIAM mi estis en Fenghuo-a Popola Komunumo de Likjuan-gubernio de Ŝenhi-provinco, mi vizitis kelkajn komunumanajn hejmojn. Mi propraokule vidis la feliĉan vivon de komunumanoj en la nova socio kaj informiĝis pri ilia mizera vivo en la malnova socio. Profundan impreson donis al mi precipe la amo de la komunumanoj al la kolektivo kaj ilia sinforgesa laborado por konstrui novan socialisman kamparon. La familio de Avino Liu Ĝenhian estas unu el tiaj familioj de ordinara komunumanoj.

Avino Liu havas la aĝon de 66 jaroj. Ŝi travivis 40 mizerajn jarojn en la malnova socio. La pezaj subpremado kaj ekspluatado forrabis la vivon de ŝia edzo. Ŝi devis vivteni tri neplenaĝajn filojn kaj du filinojn per fadenŝpinado kaj ŝtofteksado. Tial ili vivis en mizero.

Post la Liberiĝo la tuta familio de Avino Liu liberiĝis. Aktive responde la alvokon de Prezidanto Maŭ "**Organiziĝu**", Avino Liu kaj ŝiaj gefiloj unue aliĝis al interhelpa produkta grupo kaj poste aliĝis kiel la unuaj al agrikultura produkta kooperativo.

En la jaro 1956, kiam ŝia unua filo Vang Ĝengi subite trafis intestan perforadon, Vang Baŭging, la estro de la agrikultura produkta kooperativo kaj vilaĝanoj alrapidis kaj sendis lin en hospitalon en la urbo Hianjang. La popola registaro kaj la agrikultura produkta kooperativo pagis por li la koston de kuracado, vilaĝanoj donacis sian sangon al li kaj ofte iris al lia patrino por ŝin konsoli. Dank' al zorga kuracado Vang Ĝengi resaniĝis. Pro tio Avino Liu profunde sentis la varmon de la nova socio. Ŝi nomis sian nepon "Kaŭŝe" (apogi sin sur kooperativo) por esprimi per tio la dankemon de la tuta familio al Prezidanto Maŭ kaj la agrikultura produkta kooperativo kaj sian firman decidon ĉiam iri sur la socialisma kolektiviga vojo.

En la jaro 1958, Prezidanto Maŭ montris, ke "**bona estas la popola komunumo**". Avino Liu kaj ŝiaj gefiloj aktive partoprenis en la popola komunumo. Ekde tiam ŝia familio tre multe ŝanĝiĝis. Ŝia unua filo Vang Ĝengi estas responsulo de la maŝinfabrika de la brigado, la dua filo estas estro de la tria produktgrupo kaj la tria filo fari-

ĝis laboristo de fabriko post militservado en la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Kun senĉesa disvolviĝo de la kolektiva produkto la vivo de Avino Liu pliboniĝas tagon post tago. Nun ili loĝas en nova domo granda kaj hela, havas ĉiujare superbezonan grenon kaj deponitan monon kaj vivas feliĉe kun sufiĉaj vestoj kaj manĝaĵoj.

Oni ofte diris al Avino Liu: "En tiel granda aĝo vi jam ne devas labori." Sed Avino Liu diris: "Akirinte feliĉan vivon ni ne devas forgesi la aferojn de la kolektivo. Mi nepre kontribuos pli multe al la kolektivo, se mi ankoraŭ povas labori." Avino Liu laboras en vartejo de la brigado kaj ofte estis laŭdata de komunumanoj pro sia bona zorgado al la infanoj. Ŝi ne nur diligente laboras, sed ankaŭ ofte admonas siajn gefilojn al bona laboro kaj firma memoro, ke "ne estus la hodiaŭa feliĉa vivo, se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la popola komunumo", ke ili devas "labori plenenergie por la revolucio kaj kolektivo".


Parolante pri Vang Ĝengi, ĉiuj komunumanoj de la brigado laŭdis lin. Ekde la jaro 1960, li laboris kiel lernoservisto de maljuna ĉarpentisto. Komence li riparitis agrikulturajn instrumentojn por la kooperativo, poste li reformis kaj kreis novajn agrikulturajn instrumentojn. En la lastaj dekelkaj jaroj, sub la gvido de la kompartia filio li kaj kamaradoj de la maŝinfabrika sukcese reformis kaj fabrikis unu post alia ĉ. 20 specojn de maŝinoj kiel elektra kotonsensemiga maŝino, dispeciga maŝino, draŝmaŝino, kanalfosmaŝino, kotonsemilo k.a. Dank' al tio multe altiĝis la produkta efikeco, granda parto de la laborfortoj estis liberigita. Iuj el la agrikulturaj instrumentoj faritaj de ili eĉ estis disvastigitaj tra la tuta provinco.

Vang Ĝengi, kiu nur kelktage vizitis lernejon en la malnova socio, nun jam lertas en ĉarpentado, forĝado, tornado, veldado kaj maŝinriparado. Kaj li estas ankoraŭ elstara traktoristo. Kiam la komunumanoj laŭdis lin, li ĉiam diris: "Mi ja ne estas tiel talenta kiel vi honoris. Se mi reformis kelkajn agrikulturajn instrumentojn kune kun la aliaj kamaradoj, tio estis rezulto de kulturado de la Partio al mi en la bonaj kondiĉoj kreitaj de la popola komunumo."

Tio estas prava. En infanaĝo Vang Ĝengi volis lerni ĉarpentadon, sed lia familio estis tiel malriĉa ke li eĉ ne povis aĉeti por si hakilon. De kie li povus akiri kondiĉojn por lerni? Post la fondiĝo de la popola komunumo, la brigado starigis maŝinfabrikon kaj aĉetis multajn instalaĵojn, tiam do li ekhavis kondiĉon por lerni teknikon. Por altigi lian teknikan nivelon la kompartia filio de la brigado sendis lin al fabriko de agrikultura maŝino de Hi-an por lerni. Cetere li multfoje ĉeestis kunvenojn pri agrikulturaj maŝinoj de la provinco, subprovinco kaj gubernio kaj vizitis multajn lokojn por lerni.

La kompartia filio de la brigado ofte edukis lin por ke li havu grandan komunisman idealon kaj gvidu la komunumanojn en irado sur la socialisma vojo. Kiam li renkontis malfacilon en reformado de agrikultura instrumento, la kompartia filio ĉiam kuraĝigis lin por ke li ne timu malsukceson kaj serioze resumu sperton sin apogante sur la amasoj. Foje li provfabrikis tritikon draŝmaŝinon. Post du malsukcesoj, Vang Ĝengi iom deprimiĝis. Tiam kamarado Vang Baŭging, sekretario de la kompartia filio serĉis la kaŭzon de la malsukcesoj kune kun li, kaj finfine ili sukcesis en provfabrikado post ripetataj eksperimentoj.

Vang Ĝenggi, la dua filo de Avino Liu, estas 33-jara, kaj bone plenumis diversajn laborojn en la tria produktogrupo gvidata de li. Li ĉiam pensas, ke li, komunisto, devas konduki la komunumanojn senĉese marŝi antaŭen sur la socialisma vojo. En lia produktogrupo iuj komunumanoj neglektis la kolektivan produktadon, zorgis dum certa tempo ĉefe pri aĉeto de kudromaŝino, biciklo kaj konstruado de loĝdomo. Tiu tendenco altiris lian atenton. Li pensis en si, ke tio malbone influos la kolektivan produkton, se oni ne ĝustatempe korektos ĝin kaj lasos ĝin libere disvolviĝi. Sub la gvido de la kompartia filio de la brigado, li kunvokis la komunumanojn de la tuta grupo al diskutado pri tiu tendenco. Komunumanino Gin Ŝufang diris: "Prezidanto Maŭ donis al ni la feliĉan vivon, sed ni ne devas zorgi nur pri nia malgranda familio kaj forgesi la socialisman grandan aferon kaj ni devas daŭre marŝi al la alta celo de komunismo." Gin Ŝufang, komunistino kaj estrino de la kotonkultura grupo, estas tre zorgema pri la kolektivo kaj estas aktiva en laboro donante bonan ekzemplon al la aliaj. Ŝi eldiris la korajn vortojn de multaj komunumanoj. Vang Ĝenggi prenis Gin Ŝufang kiel modelon kaj vaste propagandis la bonajn homojn kaj bonajn aferojn inter la komunumanoj. Li



Vang Ĝengi en riparado de semilo

ofte diris al komunumanoj: "Ni devas heredigi al la posta generacio la stilon de penema lukto kontraŭ malfaciloj kaj la bonan tradicion de daŭra revolucio. Se ni persistas pri irado sur la socialisma vojo kaj bone funkciigas la popolan komunumon, niaj posteuloj certe vivos feliĉe. Ni novaj socialismaj kamparanoj devas havi grandan komunisman idealon."

Pro ofta socialisma edukado al la komunumanoj, la grupo ĉiam bone plenumis siajn taskojn kaj senĉese aperas novaj homoj kaj novaj aferoj. En semado de tritiko de 1973, la komunumanoj de la grupo kun granda entuziasmo finis la dissemadon kaj rapide kaj bone. Tamen iu najbara grupo ne povis transporti sterkon al iuj kampoj pro okupateco. Sciinte tion, Vang Ĝenggi tuj konsiliĝis kun la komunumanoj kaj en la sekvanta tago ili helpis tiun grupon fini la transportadon de sterko. Ili diris: "Vivante en la granda familio de la popola komunumo ni ne devas konsideri nur nian malgrandan kolektivon. Por multe kontribui al la ŝtato ni devas venki la malfacilojn de aliaj grupoj same kiel niajn." Tia nobla helpemo ofte manifestiĝas en la grupo. En la lastaj jaroj, la grupo gvidata de Vang Ĝenggi multfoje estis elektita kiel avangarda unuo de la brigado.

Inter la sep plenaĝuloj de la familio de Avino Liu, ne nur Avino Liu, ŝia unua filo kaj ŝia dua filo fariĝis avangardaj lernindaj por la aliaj, sed ankaŭ ŝiaj tri bofilinoj tre zorgas la kolektivon, plenenergie laboras konkurante unu kun la alia. Vang Kaŭŝe, la plejaĝa nepo de Avino Liu, revenis al la hejmloko diplomite de mezlernejo en 1972 por esti kamparano. Li estis ofte laŭdata de la komunumanoj pro sia diligenta laborado.



Inter Amikoj

Amikeco en kuna batalo

de HIN HUA

KVANKAM la distanco inter Tanzanio kaj Ĉinio estas tre longa, tamen ili ambaŭ apartenas al la tria mondo. Havante samajn suferojn en la historio kaj batalajn taskojn hodiaŭ, la popoloj de ambaŭ landoj strikte kunlaboras kaj reciproke lernas en la batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemonio de la superpotencoj kaj en konstruado de sia propra lando. Amikeco inter la popoloj de Tanzanio kaj Ĉinio kreskas tagon post tago en la solidara batalo.

INTIMAJ ZORGOJ

La 28-an de novembro de 1973, la ĉina medicina grupo laboranta en la regiono Musoma vizitis Ujamaa-vilaĝon apud Butiama, hejmvilaĝo de Prezidanto Nyerere. Sur la vojo returne al la restadejo kamaradino Ju Hua, interpretistino de la medicina grupo, vundiĝis pro falo. Informiĝinte pri tio, Prezidanto Nyerere, kiu venis al sia hejmvilaĝo en la 15-a de decembro por pasigi siajn feriojn, tuj sendis sian junan fraton Joseph Nyerere al la ĉina medicina grupo por fari sinceran konsolon al Ju Hua kaj aliaj ĉinaj kamaradoj kaj donaci al ili du ŝafojn. Je la vizito al kamaradino Ju Hua, Joseph Nyerere speciale eksplikis, ke unu el la ŝafoj estis preparita por festomango de la prezidanto je Kristnasko kaj la alia estis donacita de li mem. Tio montris la solidarecon de la prezidanto kaj li mem. Li insiste petis la ĉinan medicinan grupon ilin akcepti. La ĉinaj medicinaj laborantoj profunde dankis lin kaj foje-refoje provis rifuzi la donacojn sed fine devis akcepti ilin, ĉar ili montris la profundan amikecon de la tanzania popolo al la ĉina.

Nelonge poste, Prezidanto Nyerere kaj lia edzino unu post la alia venis al la ĉina medicina grupo por vidi kamaradinon Ju Hua. Lia edzino diris: "Laŭ

la kutimo de ni afrikanoj, ni donacas vivaĵojn kun sango nur al la plej intimaj amikoj kaj proksimaj parencoj. Ni ĝuste rigardas vin kiel niajn plej intimajn amikojn kaj fratinojn."

La prizorgo de Prezidanto Nyerere profunde kortuŝis kamaradinon Ju Hua kaj la tutan personaron de la ĉina medicina grupo, sed ankaŭ stimulis la aliajn ĉinajn laborantojn en Tanzanio. Ili esprimis sian decidon, ke ili nepre servos pli bone al la tanzania popolo laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ kaj faros sian kontribuon por kreskigi la amikecon inter la popoloj de Tanzanio kaj Ĉinio. Nun kamaradino Ju Hua jam resaniĝis kaj denove laboras sur sia posteno.

KUNE KLOPODI POR ALKONDUKI AKVON

Kondoa-distrikto en la meza altebenaĵo de Tanzanio estas fame konata seka regiono. Loĝantoj de tiu loko diris, ke tie ĉiun kvaran jaron okazis serioza trosekeco. Antaŭ la sendependiĝo de Tanzanio la koloniistoj monopolis la fontojn de akvo. Je okazo de trosekeco la tero diskreviĝis kaj herboj velkiĝis, kaj pro tio loĝantoj kaj brutoj mortis multnombre. En tia okazo kamparanoj devis ŝanĝi bovojn kontraŭ akvo, iam kontraŭ unu bovo oni povis ricevi nur kelkajn lagenariojn da akvo. Por trinki iom da akvo oni devis labori kiel kulioj en la farmejoj de koloniistoj aŭ formigri de la hejmo. Kaj pro tio multaj familioj ruiniĝis. Ho, kiel kara estis akvo por la loĝantoj en tiu regiono!

Post la sendependiĝo, subtenate de la registaro la loĝantoj en Kondoa-distrikto sin mobilizis por trovi akvofontojn kaj konstrui kanalojn por alkonduki surmontan akvon malsupren, sin apogante sur propraj fortoj. Por helpi ilin la ĉina registaro

sendis putokonstruan grupon al Tanzanio. En sia laboro la ĉina putokonstrua grupo ricevis de la tanzania registaro kaj la lokaj loĝantoj bonajn prizorgojn kaj multflankajn helpojn.

Kiam la ĉina putokonstrua grupo laboris en Iko-va, Musa, prezidanto de la branĉo de la Tanganjika Afrika Nacia Unio, persone gvidis ĝin fari prospektoradon en montaro kaj ĝangaloj. Krome li ankoraŭ organizis lokajn loĝantojn por haki arbojn, ebenigi teron, konstrui ŝoseojn kaj transporti maŝinojn por la grupo. Laborante en Donse-vilaĝo, la ĉina grupo devis tranokti en arbaro. La loĝantoj en tiu vilaĝo meminitate gardis ilin de sovaĝaj bestoj.

La riveroj en la regiono Dodoma ofte estas sekaj kaj en ili troviĝas eĉ ne guto da akvo sed nur sablo kaj ŝtono. Sed, kiam granda kvanto da pluvakvo torentis de sur montoj, tiuj riveroj tuj fariĝas furiozaj kaj muĝante fluantaj. Foje aŭto de ĉinaj laborantoj eniĝis en iu sabla rivero, ĝuste tiam granda kvanto da pluvakvo torentis de sur montoj en la supra baseno kaj la malsupra parto de la aŭto troviĝis en la riverakvo. En tiu danĝera momento la instruistoj, lernantoj kaj kamparanoj loĝantaj proksime rapidis al la rivero, ensaltis la akvon unu post alia kaj eltiris la aŭton kune kun la ĉinaj kamaradoj.

En julio de la lasta jaro la ĉinaj kaj tanzaniaj laborantoj kune sukcesis fosi puton en Mahongo-vilaĝo post streĉa laborado dum pluraj sinsekvaj tagoj kaj noktoj. Tiu novaĵo rapide disvastiĝis tra la najbaraj vilaĝoj kaj la amasoj tuj venis dancante kaj kantante por gratuli, kaj poste oni okazigis celebran mitingon ĉe la nova puto. Ili ĝoje kriadis foje-refoje: "Vivu Nyerere — Maŭ Zedong! Vivu Maŭ Zedong — Nyerere! Vivu Tanzanio — Ĉinio! Vivu Ĉinio — Tanzanio!"


HEROA POPOLO NETIMIGEBLA ANTAŬ MALFACILOJ

De la tanzania ĉefurbo Dar-es-Salaam ĝis Tunduma ĉe la landlimo inter Tanzanio kaj Zambio, la tanzania parto de la Tanzania-Zambia Fervojo longas je 977 kilometroj kaj havas 22 tunelojn kaj pli ol 200 pontojn. De oktobro de 1970 ĝis aŭgusto de la lasta jaro tiu parto de la fervojo estis jam antaŭdate finkonstruita. Kun progreso de la fervoja konstruado la batala amikeco inter la popoloj de Tanzanio, Zambio kaj Ĉinio senĉese firmiĝas kaj disvolviĝas.

Kiam la fervojo atingis Mbozi-distrikton en Mbeya-regiono, aperis problemoj de manko de sablo. La konstrua zono longa je 120 kilometroj estis konsiderata kiel regiono sensabla. Se oni alportus sablon de malproksima loko, tio certe malrapidigus la iradon de la konstrua laboro. Informiĝinte pri tio, iu loka gvidanto de la Tanganjika Afrika Nacia Unio tuj mobilizis la amasojn por trovi sablon. Post kelkaj tagoj multaj maljunuloj, virinoj, gejunuloj kaj geknaboj alportis sablon pakitan en papero, tukoj kaj bananfolioj, kio liveris abundon da valoraj materialoj pri fontoj de sablo. La konstrua grupo sendis siajn membrojn al Mpenba-rivero. Laŭdire, en la rivero troviĝas granda kvanto da sablo, sed neniu sciis, en kiu parto ĝi sin kaŝas. La membroj de la konstrua grupo venis al elementa lernejo apud la rivero por peti helpon. La direktoro de la lernejo tuj kunvenigis la lernantojn por demandi, kiu el ili scias pri fonto de sablo. Du lernantoj elpaŝis kaj diris, ke ili scias kaj volas iri kiel vojgvidantoj. Ekpluvis. Spite al la pluvo la du lernantoj piediris 3 kilometrojn kaj fine atingis la sablejon kun la ĉinaj teknikistoj.

Kvankam oni trovis la sablejon, tamen estis malfacile apliki maŝinojn, ĉar la sablo kuŝis sub riverakvo. Eksciinte tion la gvidanto de la distrikto persone vizitis plurajn vilaĝojn ĉe la rivero kaj alvokis la loĝantojn helpi fosi sablon. La vilaĝanoj tuj aktive respondis al la alvoko kaj venis al la sablejo kun diversaj instrumentoj. La problemoj solviĝis kaj la konstrua laboro rapide progresis.

Rondira kuracado fare de la ĉinaj medicinaj laborantoj, kiuj partoprenas en la konstruado de la Tanzania-Zambia Fervojo, ricevas laŭdon de la tieaj geamikoj.



Certe triumfos la heroaj patriotaj armeo kaj popolo de Kamboĝo

SENTIMAJ SOLDATOJ

Sieĝante Pnompenon la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo decidis ekstermi trupojn de la marioneta reĝimo en tiu urbo okupantaj la pontojn de Prektanrm kaj Chambakmeas. Kiam ĉio silentiĝis en profunda nokto, soldatoj de la popolaj armitaj fortoj ĉirkaŭis la malamikojn. Parto de la soldatoj embuskis proksime de la pontoj por gvati malamikojn.

Estis la 8-a de mateno. La popolaj armitaj fortoj komencis fortan ofensivon de diversaj flankoj. La unua grupo gvidata de Huor kaj Phen estis taskita renkonte sturmi la malamikojn kaj la aliaj du grupoj — bari forkurantajn malamikojn, por ekstermi ĉiujn malamikojn. Post 10-minuta batalo la popolaj armitaj fortoj konkeris la du malamikajn apogpunktojn, ekstermis unu malamikan kompanion kaj per tio venke plenumis la taskon ekstermi vivajn fortojn malamikajn.


Je la 9-a horo malamikoj haste ekspedis el Pnompeno pli ol 500 soldatojn por fari reatakon. Por konservi la revolucian forton, Huor kaj Phen proponis evakuon al sia trupo kaj ili mem decidis resti por ĝeni la malamikojn kaj ŝirmi evakuon de sia trupo.

Tempo restis tre malmulta. Tuj post la evakuo de ilia trupo la malamikoj sin ĵetis al ilia pozicio. En tranĉeo Huor kaj Phen brave repuŝis la atakon de la malamikoj. Iliaj kugloj kaj grenadoj estis elĉerpitaj, sed ili restis ŝtale firmaj. Kiam ili rememoris la kruelegan masakron de naciperfiduloj al la popolo kaj la agreson kaj frenezan bombardon de la usona imperiismo al Kamboĝo, ilia indigno turniĝis en forton. Ili decidis plejeble ekstermi malamikojn malgraŭ kiom ajn granda ofero.

Tiam komandanto de la malamika trupo ordonis siajn soldatojn sieĝi la pozicion kaj kriaĉis “kaptu ilin vivaj”. Huor kaj Phen tute sin forgesis kaj



Soldatoj de la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo



montris nenian timon. Ili rektigis la bajoneton, saltis el la tranĉeo kaj komencis miksbatolon. En tiu animskua lukto la du bravuloj pikmortigis pli ol 20 malamikojn kaj la ceteraj forkuris kun timo. Ili predis de la malamikoj multajn maŝin-pafilojn kaj grenadojn. Per tiuj ili ekstermis refoje multajn malamikojn kaj la tereno antaŭ ilia pozicio estis plene kovrita de malamikaj kadavroj. Ili jen pafis jen jetis grenadojn kaj la eksploda bruo tondradis tra la aero. Kiam la malamikoj ankoraŭ ne trankviligis sin de timo, ili ambaŭ laŭte kriis: "Sturmu, kaptu la naciperfidulojn kaj lasu neniun el ili forkuri!" La kriojn akompanis pluvo da kugloj kaj grenadoj. Tiam denove alvenis malamikaj helpaj trupoj. Huor heroe oferis sian vivon kaj Phen estis grave vundita je la gambo. Li kunpremis la dentojn kaj eljetis kun forta indigno la lastan grenadon al la malamikoj. Por la naciberiga afero li oferis sian lastan guton da sango. Morto por la popola intereso estas plej glora. Ili ĉiam vivos en la koro de la kamboĝa popolo.

BATALO DE BRAVAJ SOLDATINOJ

Dank' al la prizorgo kaj eduko de la Kamboĝa Nacia Unueca Fronto, la virinoj de la liberigitaj regionoj havas pli kaj pli altan politikan konscion. Ili aktive partoprenas en diversaj revoluciaj laboroj kaj faris sian kontribuon por renversi la naciperfidan klikon de Lon Nol kaj liberigi la gefratojn en la regionoj portempe okupataj de malami-

koj. Multaj junulinoj volonte partoprenis en la Popolaj Naciberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo, tiel brave batalis kontraŭ la malamikoj kaj tiel teruris la lastajn.

Okcidente de Pnompeno estas ŝoseo n-ro 4. Kiam la Popolaj Naciberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo sieĝis ĝian parton inter Kompong-Speu kaj Angsnoul, ege ektimiĝis la naciperfiduloj en Pnompeno. Ili haste ekspedis trupojn kun dekoj da kirasaŭtoj kiel antaŭirantoj intencante refunkciigi tiun gravan ŝoseon. Sed la popolaj armitaj fortoj decidis superregi la ŝoseon por ke la malamikoj ne povu transporti grenon, armilojn kaj aliajn militajn materialojn de la urbo Sihanuk en Pnompenon.

Foje, iu virina trupo de la Popolaj Armitaj Fortoj ricevis ordonon, ke ĝi baru la kirasaŭtojn de malamikoj en kunago de aliaj du frataj trupoj, por defendi la postfronton de la trupoj atakantaj malamikan apogpunkton en Thnal Totung. La virina trupo estis taskita blokadi la vojon meze de la batalkampo. Malamikaj kirasaŭtoj eniris en la embuskejon kaj dense pafadis al la pozicio de la virina trupo. Sed ili kaŝiĝis malantaŭ ŝirmejoj kaj aplombe atendis la eniron de la kirasaŭtoj en la pafkampon.

Pasis kelkaj streĉaj minutoj. Kun bruo la malamikaj kirasaŭtoj pli kaj pli proksimiĝis kaj tremigis la teron. La kanonpafoj de la malamikoj jam direktiĝis trans la embuskejon. Kiam la kirasaŭtoj



Soldatoj de la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo helpas popolanojn ekspluati teron.

atingis la difinitan lokon, la soldatinoj elsaltis kaj direktis ĉiujn armilojn al la malamikoj. La venĝaj kugloj ŝutiĝis sur la malamikojn kaj iuj kirasaŭtoj tuj estis detruitaj kaj la ceteraj tuj returniĝis kaj forkuris. Post tio la malamikoj tutan tagon ne kuraĝis veni refoje.

La sekvantan tagon la virina trupo denove estis taskita embuski malamikajn kirasaŭtojn.

En tiu tago malamikaj kirasaŭtoj refoje sin movis al la pozicio de la popolaj armitaj fortoj kaj eniris en la embuskejon de la popolaj batalantoj. Kiam la kirasaŭtoj eniris en la pafkampon de la soldatinoj, la lastaj surprize koncentris la pafadon al la malamikaj kirasaŭtoj. Iuj kirasaŭtoj estis detruitaj je la pafbruo kaj la ceteraj ĥaose retroveturis kaj forkuris panike. Sed la malamika komandanto ordonis la kirasaŭtojn puŝiĝi antaŭen laŭ alia vojo. La batalo intense daŭris. La soldatinoj firme baradis la kirasaŭtojn per akra pafado. En tiu tempo la du helpaj trupoj de la popolaj armitaj fortoj alvenis kaj kune kun ili forte batis la malamikojn. La malamikoj nur povis evakui ĉiujn lokojn.

En la du operacioj la virina trupo detruis 10 kirasaŭtojn, per kio ĝi faris kontribuon al ekstermo de malamikoj okcidente de Pnompeno.

BATALO POR LIBERIGO DE UDONG

La 18-an de marto ĉijare, nome en la 4-a datreveno de la puĉo farita de la naciperfida kliko de Lon Nol, la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo liberigis la malnovan ĉefurbon Udong,

gravan urbon nordokcidente de Pnompeno. Sub la forta atako de la popolaj armitaj fortoj, la trupoj de la marioneta reĝimo de Lon Nol, kiuj gardis Udong kaj la ĉirkaŭajn lokojn, demoraliziĝis kaj pli ol 3,700 malamikaj soldatoj estis ekstermitaj.

La ŝoseo n-ro 5 trairas Udong 34 kilometrojn nordokcidente de Pnompeno. Antaŭ 4 jaroj la naciperfida kliko de Lon Nol faris puĉon kaj turnis Udong en bazon por liveri grenon kaj brutojn al la marioneta reĝimo en Pnompeno. Por defendi tiun bazon, la naciperfida kliko de Lon Nol starigis en Udong la t.n. "plej grandan" kaj "plej firman" fortikaĵaron kaj ŝanĝis ĉiujn templojn de la regiono en kazernojn.

Sed la streĉa gardo de la malamikoj al Udong tute ne efikis antaŭ la atako de la popolaj armitaj fortoj. De la profunda nokto de la 15-a ĝis la frua mateno de la 16-a de marto, la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj faris furiozan atakon kontraŭ Udong. Kun alta batalvolo la soldatoj de la armitaj fortoj samtempe surprizis la malamikojn de diversaj flankoj. Vizaĝe al la potenca ofensivo de la popolaj armitaj fortoj la marionetaj trupoj de Lon Nol konsterniĝis kaj perdis la prudenton. Post batalo de la unua tago la popolaj armitaj fortoj konkeris plurajn apogpunktojn de malamikoj kaj direktis sian atakon al la urbo Udong. La sekvantan tagon pli brila estis la venko, nome pli ol 30 malamikaj apogpunktoj estis konkeritaj. Fine la marionetaj trupoj de Lon Nol nur povis retiriĝi en la plej rigore defendatajn apogpunktojn. Sed ankaŭ tiuj apogpunktoj ne povis bari la fortan ofensivon de la popolaj armitaj fortoj.

Posttagmeze de la 18-a de marto, la apogpunkto de Chamcarban estis detruita de la nebarebla atako de la popolaj armitaj fortoj kaj la tuta bataliono de la malamikoj inkluzive ĝian komandanton estis ekstermita. La 9-an tiuvespere soldatoj de la popolaj armitaj fortoj ensturmis Udong de ĉiuj flankoj kaj la loĝantoj varme bonvenigis siajn proprajn trupojn. Post tritaga batalo la popolaj armitaj fortoj tute liberigis la urbon Udong.

Sed la naciperfida kliko en Pnompeno ne volentis akcepti sian fiaskon kaj senĉese sendis trupojn por ataki la liberigitan Udong. Malamikaj aviadiloj ĵetis grandan nombron da bomboj kaj napalmajn bombojn al la loĝkvartaloj, temploj, antikvaj konstruaĵoj kaj aliaj konstruaĵoj. La nova daminda krimo farita de la naciperfiduloj en Pnompeno vekis pli grandan indignon de la tieaj loĝantoj kaj la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj. Ili senĉese batis la malamikojn kiuj atakis Udong.



JUGUROJ

JUGUR-NACIECO havas pli ol 5,000 membrojn, kiuj loĝas en la meza parto de la Riverokcidenta Koridoro de Gansu-provinco kaj ĉefe en la Sunan-a Jugur-nacieca Aŭtonoma Gubernio kaj Huangnibaŭ-distrikto de Giukjuan-subprovinco.

Jugur-nacieco portis nomojn “Jaŭhur” kaj “Hilajugur”. Post la Liberiĝo ĝi alinomis sin jugurnacieco laŭ volo kaj konsiliĝo de la jugurnaciecaj popolanoj.

Jugurnacieco havas siajn parolajn lingvojn “Anger” kaj “Jaŭhur” sed ne skriban. Pro miksa kunloĝado kun hanoj la juguroj scipovas paroli kaj skribi han-lingvon.

Jugurnacieco havas longan historion. Ĝiaj praavoj estis hujhu-oj de Tang-dinastio (618-907 p.K.). En la mezo de la naŭa jarcento branĉo de hujhu-nacieco transloĝiĝis de Erhun-rivera baseno al la Riverokcidenta Koridoro kaj en la mezo de la dekunua jarcento al la regiono de Dunhuang ĝis Hami okcidente de Giajuguan-pasejo por paŝtado.

En la komencaj jaroj de King-dinastio (1644-1911 p.K.) la juguroj ĉe Huangnibaŭ de Giukjuan komencis okupiĝi pri agrikulturo, iliaj terkulturaj metodoj estis tute samaj kiel tiuj de tiulokaj hanoj pro ilia miksa loĝado. Ili ĉefe kulturis tritikon, milion, terpomon, sekalon, sojon, olelinon kaj aliajn. Antaŭ la Liberiĝo klasa polarizo de la juguroj jam estis tre rimarkinda. Laŭ statistiko, la bienuloj kaj kulakoj, kiuj okupis nur 9% de la tuta loĝantaro, posedis 33% de la agraro; 58% de la mezkamparanoj kaj etbienaj luigantoj okupis 53.3% de la agraro; 33% de la malriĉkamparanoj kaj dungitoj okupis nur 13.7% de la agraro.

La juguroj de Sunan ĉefe okupiĝis pri nomada paŝtado. Antaŭ la Liberiĝo ili vivis sub rigora regado de triba feŭdismo, tial la produkto estis tre malstabila. Tiam la herbejoj estis posedataj de tribo, temploj kaj privatuloj. Plejparto de la her-

bejoj kaj brutoj apartenis al la ĉefoj de la tribo, supertavoluloj de temploj kaj brutoposedantoj. Ili kruele ekspluatis la malriĉajn paŝtistojn per dungado, ludonado de herbejo kaj uzurado. La ĉefoj de la tribo ofte sin riĉigis profitante la ŝancon, ke la reakcia registaro rekviziciis de la paŝtistoj ĉevalojn kaj ŝafojn.

La juguroj de la paŝta regiono Sunan ĝenerale kredis lamaismon en la pasinteco. Ĉiu tribo posedis sian templon, kies superuloj havis striktan rilaton kun la ĉefoj de la tribo kaj partoprenis en decido de ĝiaj gravaj aferoj. Ĉiu templo havis sian feŭdan ekspluatantan sistemon, juĝejon kaj malliberejon kun torturiloj kaj faris kruelan persekutadon al malriĉaj paŝtistoj; krome ĝi devigis la paŝtistojn fari senpagajn laborojn, doni donacaĵojn kaj sendi siajn infanojn al templo por fariĝi lamaoj.

Ĉasado kaj kolektado de drogherboj estas gravaj flankaj okupoj de la juguroj. En ilia regiono troviĝas diversaj bestoj, birdoj, drogherboj kaj lokaj produktaĵoj. La enspezo de tiuj flankokupoj



konsistigas 30-50 % de la totala enspezo de la paŝtistoj. Sed antaŭ la Liberiĝo la cervokorno, mosko, altvaloraj feloj kaj drogherboj akiritaj de ili estis ofte forrabitaj de la reakcia registaro kaj la regantoj de la tribo kaj temploj.

En la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito, la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo pasis tra la Riverokcidenta Koridoro, la jugur-naciecaj popolanoj donis al ĝi grandan subtenon. Multaj el la juguroj eĉ oferis sian vivon en transportado de greno, vojevizado kaj savado de vunditaj soldatoj por la Ruĝa Armeo. Ankaŭ la heroaĵoj de la Ruĝa Armeo kaj ĝia amo al la popolo forte impresis la jugurajn popolanojn kaj instigis ilin al firma batalo kontraŭ la reakcia registaro kaj la subpremantoj de ilia nacieco.

En 1949 Gansu-provinco liberiĝis kaj la revolucia ruĝa flago denove flirtis super Kilian-montaro. De tiam la suferplenaj juguroj komencis novan vivon. Sub la brilo de la nacia politiko de la Partio fondiĝis la Sunan-a Jugur-nacieca Aŭtonoma Gubernio kaj la Huangnibaŭ-a Jugur-nacieca Distrikto, kio multe akcelis disvolviĝon de la ekonomio, kulturo kaj eduko de la juguroj. Tra paca interkonsiliĝo kaj sur la bazo de plena mobilizo de la amasoj oni abolis la feŭdan posedsistemon kaj fondis administrajn komitatojn por efektiviĝi unuecan mastrumadon al la stepoj, ĉiuf flankan planadon kaj racian utiligon. En la jaro 1958, surbaze de la agrikultura kooperigo la vastaj amasoj de paŝtistoj levis la batalon kontraŭ la feŭda privilegio de religio kaj ekspluata sistemo kaj plene praktikis la politikon pri libereco de religia kredo. Post la popolkomunismo la juguraj popolanoj ŝanĝis la antaŭan fizionomion de malriĉeco kaj postiĝinteco. En 1949, Sunan-gubernio havis nur 82,000 brutojn grandajn kaj malgrandajn, sed en 1971 jam 580,000. Samtempe kun disvolviĝo de la brutobredado la juguraj popolanoj aktive disvolvas agrikulturan produkton kaj faris senlaca batalon por produkti pli da greno per ekspluatado de virga tero, konstruado de ŝtuparaj kampoj kaj entreprenado de akvoutiliga afero. Longfeng-brigado de Ŝang-joŭ-komunumo ne nur ĉiujare superplenumis la taskon asignitan de la ŝtato, sed ankaŭ efektiviĝis memprovizon de greno dank' al disvolvado de agrikultura produkto dum la lastaj jaroj, tial ĝi fariĝis ruĝa flago de Sunan-gubernio en la movado lerni de Daĝaj en agrikulturo.

Antaŭe Sunan ne havis industrion, sed nun ĝi jam starigis prilaborejon de felo, fabrikojn de agrikulturiloj, lakto, elektro, faruno, karbominejon kaj aliajn. Antaŭ la Liberiĝo troviĝis neniu ŝoseo en

tiu regiono kaj la transportado estis farata ĉefe per ĉevaloj kaj poefagoj, sed nun la aŭtovojoj ligas la gubernian urbon kun la distriktoj, tiel ke granda kvanto da materialoj estas alportita al la paŝta regiono. Hongvansi, la sidejo de la Sunan-a Jugur-nacieca Aŭtonoma Gubernio, antaŭe estis sovaĝejo, kaj nun ĝi jam fariĝis nova urbo sur la stepo kaj la centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de jugur-nacieco.

Post la Liberiĝo la juguroj akiris politikan liberiĝon, fariĝis mastroj de la ŝtato kaj havas sian reprezentanton en la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj. La diversnivelaj gvidantoj de la gubernio, distriktoj kaj komunumoj plejparte estas juguroj. Antaŭ la Liberiĝo Sunan-gubernio funkciigis nur kvar kadukajn elementajn lernejojn. Nun ĝi jam havas 35 mezgradajn kaj elementajn lernejojn kaj multajn "rondirajn elementajn lernejojn", kies instruistoj profundigis en paŝtejojn por ke ĉiuj infanoj ricevu edukadon. Granda nombro da junaj juguroj fariĝis traktoristoj, ŝoforoj, sanitaristoj, veterinaroj, librotenistoj kaj instruistoj. Nun ĉiu distrikto de la gubernio havas sian hospitalon, ĉiu komunumo kuracejon kaj ĉiu produkta brigado kamparajn kuracistojn. La centraj kaj provincaj kurac-grupoj ofte rondiras al ili por doni kurachelpojn. En la pasinteco, al la juguroj mankis kaj kuracistoj kaj medikamentoj, tial malsanoj ĉie cirkulis kaj la loĝantaro reduktiĝis jaron post jaro. Tia ŝtato nun jam forpasis por ĉiam.






La juguroj estas lertaj en metiarto. La de ili trikitaj sakoj, tapiŝoj kaj ĉevalaj bridoj estas broditaj per belaj desegnoj. Ankaŭ manikoj kaj kolumoj de virinaj vestoj kaj botoj estas vivece kaj kolore broditaj per diversaspecaj floroj kaj birdoj.

Jugur-nacieco havas riĉan buŝan literaturon inkluzive de historiaj tradicioj, rakontoj, proverboj kaj popolkantoj. Ĝiaj popolkantoj kun aparta gusto karakteriziĝas per simplaj kaj ĉarmaj arioj kaj riĉaj enhavoj. Post la Liberiĝo la popolkanto *Feliĉo* prikantanta la novan socion estas tre ŝatata de la juguroj. Ĝi tekstas jene:

*Se ne estus nuboskrapa Kilian-montaro,
Ne estus la de ĝia neĝo akvumata grenkamparo;
Se ne estus la rivero Ginŝa klara kaj torenta,
Ne estus step' smeralda, vaste la etenda;
Se ne estus de l' Parti' kaj Prezidanto Maŭ la
saĝa gvido,
Ne estus nuna kaj morgaŭa la feliĉ' ĉiam kun rido.*

Amikeco la Unua

Pentrita de Miaŭ Jintang





Ĉina Geografio

Grundoj de Ĉinio

ĈINIO havas vastan teritorion kun diversaj specoj de grundoj. La komplikaj kondiĉoj de klimato, rokoj, topografio kaj vegetalaro kaj la longa historio de agrikulturo ebligas al nia lando posedi multajn specojn de grundoj. De la sudoriento ĝis la nordokcidento laŭvice troviĝas arbara grundo, stepa grundo, dezerta grundo k.c. Krome troviĝas ankaŭ salalkala kaj humida grundoj.

SPECOJ KAJ DISLOKIĜO

Ruĝa kaj flava grundoj: Ili ĉefe troviĝas en la provincoj Hunan, Gianghi, Fugian, Tajvan, Siĉuan, Guangdong, Junnan, Gujĝoŭ kaj la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono sude de Jangzi-rivero.

La ruĝa kaj flava grundoj estas du el la plej antikvaj grundoj de la mondo kaj portas ruĝan kaj flavan kolorojn pro sia grandkvanta enteno de fera kaj alumina oksidoj. La ruĝ- kaj flav-grundaj regionoj de Ĉinio abunde produktas grenon, kaj produktas ankaŭ tropikajn ekonomiajn plantaĵojn, kiel kaŭĉukarbo, kafo, kokao kaj olepalmo.

Tia grundo pli fekunda por rizo troviĝas en la tropika kaj subtropika regionoj de suda Ĉinio. La grundo estas kreita de la ĉina laboranta popolo en longdaŭra konstruado de kanaloj kaj ŝtuparkampoj, zorgema kultivado, irigacio kaj sterkado. Sur la ebenaĵoj kun reto da riveroj sude de Jangzi-rivero troviĝas granda areo de tia grundo, kiu multe kaj stabile produktas rizon kaj tritikon en sama jaro. La kampoj formitaj el sufiĉe grasigita porriza grundo sur la delto de Perlo-rivero donas tri rikoltojn de rizo en sama jaro.

Bruna arbara grundo: Ĝi troviĝas ĉefe en la marbordaj Ŝandong kaj Liaŭdong-duoninsulo de norda Ĉinio, kaj en la regionoj de Ĉangbaj-montaro kaj la Malgranda Hing-an-montaro. Ĝi estas flave bruna, glueca, kaj en ĝi la elementoj bezonataj de vegetaloj estas pli riĉaj ol tiuj en la ruĝa kaj flava grundoj. Tia grundo estas tre konvena por kultivi plantaĵojn kaj fruktoarbojn. La regionoj de bruna

arbara grundo jam fariĝis fame konataj lokoj de pomo, piro, persimono, nukso kaj kaŝtano en norda Ĉinio.

Nigra kalcia grundo kaj nigra grundo: La antaŭa troviĝas ĉefe en la okcidenta parto de la Nordorienta Ebenaĵo. Ĝi estas formita el dika humo sub stepa vegetalaro de graminacoj kaj legumenacoj.

La nigra grundo konsistanta el pli dika tertavolo kaj senkalcia tavolo troviĝas ĉefe en la nordorienta parto de la Nordorienta Ebenaĵo kun relative humida klimato.

Ili ambaŭ estas tre fekundaj kaj konvenaj por kultivi tritikon, sorgon, maizon, milion, terpomon, sojfabon kaj sukerbeton. Post longdaŭra kultivado, nia laboranta popolo jam ŝanĝis la vastajn regionojn de nigra kalcia grundo kaj nigra grundo en "grenejojn".

Kaŝtana kalcia grundo: Ĝi troviĝas okcidente de la nigra kalcia grundo, inkluzive de la orienta parto de la Interna Mongolio. Relative seka klimato de tiuj regionoj reduktis humon en la grundo kaj ĝin helkolorigis, sed la fekundeco ankoraŭ konserviĝas. Tiuj regionoj estas brutobredaj bazoj de Ĉinio.

Humida grundo kaj bruna grundo: La antaŭa troviĝas ĉefe en la aluvia ebenaĵo de la Flava Rivero, Hajhe-rivero kaj Huajhe-rivero; la lasta en iliaj okcidentaj montregionoj kaj la orienta parto de la Loesa Altebenaĵo, inkluzive la provincojn Ŝanhi, Ŝenhi, Henan, Hebej kaj Ŝandong, kiuj estas ĉefaj lokoj de greno kaj kotono en norda Ĉinio.

Dezerta grundo: Ĝi troviĝas en la vastaj internaj regionoj de nordokcidenta Ĉinio, inkluzive la provincojn Gansu, Kinghaj kaj aŭtonomajn regionojn Ninghia, Hingiang. La fame konata "silka vojo" en la ĉina historio trairas tiujn regionojn.

La naturaj kondiĉoj de la regionoj de dezerta grundo estas malbonaj, ke ili multe suferas de sekego, salalkalo kaj sablovento. Sed la diversnaciaj laborantaj popolanoj tie loĝantaj generacion post generacio faris obstinan batalon kontraŭ la naturaj

katastrofoj kaj kreis multajn rimedojn kontraŭ ili en longdaŭra produkta praktiko, ekzemple subteraj kanaloj kaj gruzaj kampoj por utiligi subteran akvon kaj redukti elvaporigon.

Salalkala grundo: Ĝi troviĝas sur marbordaj ebenaĵoj, sekaj kaj duon-sekaj ebenaĵoj, basenoj, rivervaloj kaj malaltaj lokoj interne de la lando. Salalkalo tre malutilas por plantaĵoj, sed post reformado, la kampoj kun salalkala grundo povas fariĝi bonaj kampoj.

REFORMADO KAJ UTILIGO

En la malnova Ĉinio, pro la longdaŭra malracia kultura sistemo, senplana hakado de arbaro kaj senlimigita brutopaŝtado sur stepo detruigis la vegetalaro, kio kaŭzas gravajn korodiĝon kaj erozion de grundo.

Nelonge post sia fondiĝo, la nova Ĉinio komencis enketadon kaj esploradon por malhelpi erozion de ruĝa grundo kaj altigi ĝian fekundecon. En la regionoj de ruĝa grundo oni faras raciajn sterkadon kaj alternan kultivadon, sintezan administradon kaj reformadon de koroditaj deklivaj kampoj en ŝtuparajn k.c., kio ludis gravan rolon por reformi grundon kaj akceli agrikulturan produktadon. Samtempe kun tio, por solvi la problemon de erozio de grundoj en la meza baseno de la Flava Rivero oni entreprenis sintezan esploron kun la akva kaj grunda konserviĝo kiel centro. Nun, oni konstruis

grandan nombron da ŝtuparaj kampoj en la baseno kaj ankaŭ la forstumita kaj herbizita areo rapide grandiĝas, kio iom post iom haltigis la grundan erozion. En la pasinteco la regiono ofte suferis de naturaj katastrofoj kaj devis provizi sin per greno transportita el sudaj lokoj. Nun tiu regiono troviĝas en sia fizionomio jaron post jaro, akiris agrikulturajn riĉrikoltojn en lastaj jaroj kaj unuapase ŝanĝis la grenmankan staton. Post la popolkomunumigo en 1958, Ĉinio komencis relative grandskalan reformadon de dezerto. En la pasintaj pli ol 10 jaroj oni kulturis multajn forstajn zonojn, kiuj multe reduktis damaĝon kaŭzitan de sablovento. Nun, sur senlimaj dezertoj, precipe ambaŭflanke de la "silka vojo", oni kreis multajn oazojn, starigis produktajn bazojn de greno kaj kotono, el kiuj estas la fame konataj kultivejoj borde de Tarim-rivero en suda Hingiang kaj la kultivejoj de Sihezi en norda Hingiang. En la reformado de salalkala grundo oni prenas drenadon kaj irigacion kiel la ĉefan laboron kaj rikoltis certan sukceson. Nun la areo de salalkala grundo reduktiĝas iom post iom kaj ĝia triono estis reformita.

En nia lando nun plue disvolviĝas amasa movado por reformi montojn kaj riverojn kun porakva konstruado kiel la centro. Oni racie utiligas kaj reformas la grundon kaj senĉese grandigas la areon de kampoj stabile kaj multe donantaj. Ĉio ĉi tio akcelas la disvolviĝon de agrikultura produktado.

Grundoj de Ĉinio

I. Arbaraj grundoj

1. griza grundo
2. bruna grundo
3. ruĝa kaj flava grundoj
4. ruĝa grundo

II. Arbaraj kaj stepaj grundoj

5. nigra grundo
6. nigre bruna grundo

III. Stepaj grundoj

7. nigra kalcia grundo
8. grundo de la tipo de nigra kalcia grundo
9. kaŝtanbruna kalcia grundo

IV. Dezertaj kaj duon-dezertaj grundoj

10. griza kalcia grundo, bruna kalcia grundo, dezerta kalcia grundo


V. Grundoj sur la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo

11. monta arbara grundo

12. monta stepa grundo

13. monta duondezerta kaj dezerta grundo

14. Insularoj en la Suda Ĉina Maro



Sur la Kovrilo:

Petrolaj laboristoj

Sur la Dorskovrilo:

Mateno



EL POPOLA ĈINIO 中國新道


Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (191) 1974

Ĉefa Enhavo

Fervojo transiranta sennombrajn montojn kaj riverojn	1
Pretiĝis la unua parto de la Dangiangoŭ-a Akvo- reguliga Ŝlosila Konstruaĵo	9
Vizito al ambaŭbordoj de Hangiang-rivero	13
Nova atingo de ŝipkonstruejo	16
Feraj atestoj nemoveblaj kiel monto	19
Neniam "indulgemon" al la klasaj malamikoj	25
La esenco de "bonkoreco" estas restaŭro	26
Eminenta arkopafistino Vang Ven-gjuan	27
Batalo ĉe Hiŝa-insularo (Raporto en versoj)	29
Zorgema servo al klientoj	35
Higienaj laboroj en kamparo	38
Familio de komunumano	40
Amikeco en kuna batalo	42
Certe triumfos la heroaj patriotaj armeo kaj popolo de Kamboĝo	44
Juguroj	47
Grundoj de Ĉinio	50

La irrigacia regiono de Ruĝa Flago



La artefarita rivero Ruĝa Flago
serpentumanta tra Tajhang-montaro.

de la kanalo ago sur socialisma vojo

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la vasta laboranta popolo de Linhian-gubernio de Henan-provinco de Ĉinio konstruis per 10-jara penlaborado la artefaritan riveron Ruĝa Flago sur la impona Tajhang-montaro, kaj per tio finis la historion de serioza malabundeco de akvo de la loko kaj ŝanĝis la antaŭan mizeran montregionon en novan prosperan socialisman kamparon.

En la malnova socio Linhian-gubernio abundis je kalvaj senakvaj montoj kaj la popolo malfacile vivis en mizero. Por akiri vivbezonan akvon la loĝantoj de multaj tieaj vilaĝoj devis piediri al lokoj malproksimaj je kelkaj aŭ eĉ dekelkaj kilometroj. Post la Liberigo la popolo decidis reformi la naturon de la gubernio. Sub la gvido de la Partio la popolanoj konstruis la kanalon Ruĝa Flago longan je 1,500 km. kaj alkondukis akvon de Ĝanghe-rivero en Ŝanhi-provinco tra Tajhang-montaro por irigacii la teron de Linhian-gubernio. Realiĝis la miljara espero de tieaj popolanoj ke akvo fluos preter ilia vilaĝo. La irigacia areo de la tuta gubernio kreskis de 800 hektaroj ĝis 40,000 hektaroj kaj la pomua produkta kvanto de greno pliiĝis de ĉ. 50 kg. ĝis 294 kg. Ambaŭborde de la kanalo prosperas la agrikulturo, forstumo, brutobredo, flankokupoj kaj fiŝbredo kaj ankaŭ malgrandaj fabrikoj de fer-ŝtalo, elektro, cemento, kemisterko k.a. rapide fondiĝis. La ŝanĝigo de Linhian-gubernio estas granda venko de Maŭzedongpenso.

Nemalmultaj el la fremdlandaj amikoj, kiuj vizitis Ĉinion, pririgardis la kanalon Ruĝa Flago. Ili varme laŭdis la revolucian spiriton de Linhian-anoj en reformo de la naturo. Sed, la itala kontraŭĉinia klaŭno M. Antonioni malice ŝutis koton al la socialisma nova Ĉinio kaj la popolo de Linhian-gubernio per ekstreme malnobla maniero en la de li farita kontraŭĉinia filmo *Ĉinio*. Jenaj fotoj estas forta rebato al la mensogoj kaj kalumnioj de Antonioni.


La kanalo kreis irigacian reton en la tuta gubernio kapablan irigacii, konservi kaj dreni akvon, tiel por ŝtuparaj kampoj kiel por ebenejoj.



Draŝejo de la komunumo




Kombajno rikoltas tritikon.






Infanoj vivas feliĉe sub la prizorgo de la Partio.

Per siaj konkretaj travivaĵoj kaj la granda ŝanĝiĝo de sia hejmloko, komunumanoj de Ĵencun-komunumo forte kritikas la kalumniojn de Antonioni en lia kontraŭĉinia filmo kontraŭ la Linhian-gubernia popolo.





Lernantoj de brigada elementa lernejo



Komunumanoj aĉetas ŝtofon en brigada foiro.



Porcelanaĵo

